

POLA ESPERANTISTO

MARTO - APRILO NRO 2/1973 J.

Zl. 6.—



LINGVAJ BARIEROJ

Interparolo kun d-ro RENATO CORSETTI, prezidanto de la Tutmonda Esperantista Junulara Organizaĵo

Via kongreso okazis en Toruń kadre de la solenadoj de la Kopernika Jaro. Ĉu ĝi estas ordinara kongruo de cirkonstancoj?

— Nia aranĝo komencis la solenadojn de la kopernika datreveno en la internacia skalo. Mikolaĵ Kopernik estas proksima al la junulara esperantista movado. Fascinis nin ĉe Kopernik la kapablo rigardi al la mondo super la pensaj skemoj akceptataj kiel naturaj veroj. Ni ankaŭ renkontas en nia agado muŝegon de fosiliaj pensoj, stereotipoj kaj superstiĉoj. Ekzemple Esperanton oni senkreditigas kiel lingvon artefaritan. Ĝi estas artefarita nur en tiu senco, ke ĝi konsistigas logike ordigitan sistemon lingvan, sed

ĉiuj elementoj gramatikaj kaj leksikologiaj estas ĉerpitaj rekte el naturaj lingvoj. La artefariteco de Esperanto estas do nocio almenaŭ nepreciza. La oponentoj nek devigas sin al la peno difini la artefaritecon de la internacia lingvo, nek formuli eventualajn mankojn rezultantajn el tiu ĉi fakto, aliflanke ili atakas la principon mem de la artefariteco. La bazo por tia konvinko estas ĝuste la fosilia stereotipo, kvazaŭ interŝanĝado de pensoj ne povus esti okazanta per la lingva kreitaĵo, kiu ne estas natura. Oni ne povas pretendi al aĵo pro tio, ke ĝi estis elpensita, se tio, kio ni estas, ni estas dank' al tio, kion ni elpensis. En la sfero de la komunikado komprenata kiel fizika

daŭrigo sur la 12—13 paĝoj

AŬTUNA FOLIARO

Foliaro, flirte danca,
 en koloroj centnuanca,
 prujnmordite, ventpelate
 ŝvebas ĉie: kampe, strate;
 jen kuniĝas, jen dissaltas,
 tie sinkas, tie haltas
 por susuri, sible plendi,
 jen funebre por silenti,
 poste supren, ek pro blovo,
 sed sencele kaj sen povo
 ĝis ĝi ĉesas kirle krozi
 kaj ariĝas por ripozi,
 kuŝi kiel morta garbo
 sub soleca seka arbo.

JULIO BAGHY



La 18-an de marto en la 1966 jaro mortis unu el la plej elstaraj plumhomoj verkintaj en la internacia lingvo — Julio Baghy.

Lastfoje mi vidis lin dum la budapeŝta Universala Kongreso, kiam li estis parolanta dum la solena inaŭguro kaj per voĉo tremanta de emocio li eldiradis la salutajn vortojn en maniero nur al li propra. Estas homoj, kiujn oni ne povas ne ŝati, ne admiri. Al tiaj certe apartenis Baghy.

Multo estis kaj estos skribita pri liaj poemoj, prozaj verkoj, pri lia admirinda komedio „Songe sub pomarbo”. Sendube, kiel unu el la plej eminentaj reprezentantoj de la frua periodo de la originala literaturo en la internacia lingvo, li estos objekto de kritikistaj studoj kaj publikaĵoj. Ne estas eble mia specializo disertacii pri la verkoj de Julio Baghy. Por diri la veron, mi ĉiam pli sentis lian poezion, ol studis ĝin. Tiu ĉi poezio

estis kiel li — simpla, kio ne signifas — malsublima, emanis el ĝi boneco, komprenemo pri homaj malĝojoj kaj zorgoj, filozofa scio pri la vivo, preteco servi al aliaj.

Li malhavis la doktecon de Kalocsay, la talentegon de Auld, la poezikapablon de Ragnarsson, sed estis en li po iom ĉio el ili, kirlita en plej mirinda miksaĵo, mirinda, unika, bunta kiel tiu foliaro aŭtuna, kiun li pentris tiel vivantece.

JG

LASTMOMENTE

● La 14-an de aprilo 1973, en la 56 datreveno de la morto de la kreinto de la internacia lingvo, estis malkovrita en Bjalistoko bustmonumento al Ludoviko Zamenhof. La solenaĵon partoprenis kelkcent loĝantoj de la naskiĝurbo de Ludoviko Zamenhof, reprezentantoj de la urbaj aŭtoritatoj, esperantistoj el la tuta Pollando kaj membroj de la Prezidumo de la Ĉefa Estraro de la Pola Esperanto-Asocio.

● La vicmarŝalo de la pola parlamento, Sejmo, prezidanto de la Centra Komitato de la Demokrata Partio, Andrzej Benesz akceptis la prezidanton de la Ĉefa Estraro de la Pola Esperanto-Asocio, s-anon Stanisław Świstak la 17-an de aprilo 1973. La temo de la interparolo estis interalie preparoj al la XVIII Tutlanda Kongreso de la Polaj Esperantistoj en Sopot. Kiel konate, Andrzej Benesz estas vicprezidanto de la Organiza Komitato de la kongreso. La vicmar-

ŝalo de la parlamento promesis sian partoprenon en la solena inaŭguro. Oni devas substreki, ke la aŭdienco ĉe Andrzej Benesz estis jam la dua laŭvice en la daŭro de tri monatoj.

● Reprezentantoj de la Esperanto-organizaĵoj el la socialismaj landoj kunvenis la 19-an kaj 20-an de marto 1973 en Budapeŝto kaj pripaŝolis problemojn de la plua kunlaborado de la organizaĵoj por pli efika uzado kaj disvastigado de la internacia lingvo serve por la paco kaj socia progreso.

● En Bjalistoko, okaze de la estado lige kun la malkovro de la bustmonumento al Ludoviko Zamenhof, la prezidanto kaj la ĝenerala sekretario de la Pola Esperanto-Asocio, Stanisław Świstak kaj Andrzej Pettyn, renkontiĝis kun membroj de la loka filio de PEA. Oni konatigis la ĉeestantojn kun la aktualaj atingoj de la esperantista movado en Pollando kaj taskoj por la plej proksima estonto. En la diskuto oni tuŝis plurajn esencajn problemojn de la enlanda movado. Oni decidis, ke en la unua duono de junio 1973 okazos elekto de nova estraro de la Filio de PEA en Bjalistoko.

POLA ESPERANTISTO — dumonata organo de la Pola Esperanto-Asocio. La adreso de la administracio kaj redakcio: 00-013, Varsovio 1, Jasna 6, Pollando. Ĉefredaktoro: Roman Dobrzyński. Redaktas Komitato: Roman Dobrzyński, Jerzy Grum, Andrzej Pettyn, Stanisław Świstak (prezidanto). La abonokosto en la okcidentaj valutoj — por la tuta jaro (inkluzive la afrankon): por Eŭropo, Afriko kaj Azio — 1,60 dol.; por Usono kaj Kanado — 2,20 dol.; por Aŭstralio kaj Nov-Zelando — 0,153 ang. p. — aŭ egalvaloro en la okcidentaj valutoj. La monon oni sendu al: Warszawa, str. Wackerka 10, NBP — XII, O/M Nr 153-6-71, menciante la celon de la enpago. La prezo por unu numero — 2 rpk.

POLA ESPERANTISTO (Esperantysta Polski) — dwumiesięcznik Polskiego Związku Esperantystów; Warszawa, Jasna 6 (tel. 27-82-67). Prenumeratę na kraj przyjmują urzędy pocztowe, listonosze oraz Oddziały i Delegatury „Ruchu”. Można również dokonywać wpłat na konto PKO Nr 1-6-100020 — Centrala Kolportażu Prasy i Wydawnictw „Ruch”, W-wa, Towarowa 28. Prenumeraty przyjmuje się do 15 dnia miesiąca poprzedzającego okres prenumeraty. Cena prenumeraty rocznej — 36.— zł. Prenumeratę na zagranicę, w wysokości 50,40 zł rocznie, przyjmuje Biuro Kolportażu Wydawnictw Zagranicznych „Ruch”, Warszawa, Towarowa 28, tel. 20-46-88, konto PKO Nr 1-6-100024.

„SAPERE AUSEO”

(Al tiu, kiu kuragis esti saĝa)

WŁODZIMIERZ ŻYTYŃSKI

LA jaro 1973 estas proklamita en Pollando kiel **JARO DE LA POLA SCIENCO**. En tiu ĉi jaro okazas solenaĵoj lige kun gravaj datrevenoj: la 500 naskiĝdatreveno de la fama pola astronomo Mikolaĵ Kopernik; la 200 datreveno de la fondo de Komisiono por la Nacia Edukado, kiu estis la unua en Eŭropo ministerio por la klerigo; la 100 datreveno de la fondo de la Pola Akademio de la Scioj en Krakovo, kiu grupigis polajn sciencistojn el ĉiuj provincoj de la tiam dispartigita Pollando kaj estis la plej evidenta pruvo, ke kvankam Polujo kiel sendependa ŝtato estas forviŝita de sur la mapo de Eŭropo, la pola scienco ludas rolon en la mondo.

En la ombro de ĉi tiuj tri ĉefaj datrevenoj staras aliaj, ankaŭ gravaj, ankaŭ ligitaj kun la pola kulturo. Inter ili elstaras precipe la 200 datreveno de la morto de tiu eminenta pola patrioto, edukisto, politikisto kaj multflanka aganto, kiu per la penado kaj laboro de sia tuta vivo vekis la dormintan dum la „saksa epoko” pola nacion kaj inspiris ĝin per nova spirito, kiu per sia publicista agado kaj lernejreformo stimulis ĝin al renovigo de la pola kulturo kaj restarigo de la pola ŝtata organismo, kiu fariĝis kreinto, kvazaŭ „patro” de la moderna, progresema pola intelektularo, ĉar li edukis la unuajn generaciojn de kleruloj, kiuj post kelkaj dekoj da jaroj fondos la Komisionon por la Nacia Edukado, reorganizos la falantan ŝtaton dum la Kvarjara Sejmo kaj proklamos la Konstitucion de la 3 de Majo.

Temas pri Stanisław Konarski. „Sur la fono de la dekadenco en la politika kaj kultura vivo de Polujo dum la unua duono de la XVIII jarcento — skribas Zdzisław Libera — la persono de Stanisław Konarski estiĝas simbolo de nova tempo kaj anonco de nacia renaskiĝo. Kun lia nomo oni ligas la komencon de racionalismo en Pollando, kiam — post la ŝanĝoj en la ekonomia kaj socia vivo — sekvis ankaŭ ŝanĝoj en la scienco, literaturo kaj kulturo”.

Liajn grandegajn meritojn pri taksis jam liaj samtempuloj. Reĝo Stanisław August — Stanisławo Aŭgusto ne nur invitis lin por la famaj „ĵaŭdaj bankadoj”, sed omaĝe al li ordonis

emisii specialan medalon kun lia vizago kaj la surskribo: „Sapere auso”.

Stanisław Konarski naskiĝis la 30-an de septembro en la 1700 jaro, en la komenco de la „saksa epoko”, kiu daŭris 66 jarojn, kaj kiu apartenas al la plej malsukcesaj periodoj en la 1000-jara historio de la pola nacio. Sub la regado de du reĝoj el la saksa dinastio — Aŭgusto II kaj Aŭgusto III, dum la vivo de du generacioj, la ŝtato ruliĝis al la rando de abismo. Malkreskis la militara kaj ekonomia forto de la Respubliko. La urboj en ruinoj, la vilaĝoj en mizero, fremdaj armeoj „mastrumis” en Polujo kvazaŭ en subigita lando. Generala obskureco, la lernejoj en la manoj de la monaĥaro, ĉefe de jezuitoj kaj piordenanoj, disvastiĝado de malklereco, obskurantismo kaj mezepokeca religia fanatikismo.

Sanigi la politikajn, ekonomiajn kaj kulturajn kondiĉojn povis kaj rajtis laŭleĝe nur la Sejmo (pola parlamento), tamen la sejmaj debatoj estis neniigitaj aŭ rompataj de deputitoj pagataj de la najbaraj ŝtatpotencoj. La nobelara klaso, kiu tiam regis Pollandon, kredis senpripenso, ke Polujo staras dank’ al la malordo, ĉar la najbaroj bezonas malfortan Pollandon.

En tiuj ĉi cirkonstancoj Stanisław Konarski kreskis kaj maturiĝis. Kiel dekkvinjara junulo, li aliĝis al la vicoj de la piordenanoj (Ordo Clericorum Scholarum Piarum). Tiu ĉi ordeno certigis al li profundan edukitecon. Post kelkjara lernado en la lernejo de tiu ĉi ordeno en Piotrków, post teologiaj studoj en Varsovio, en la dudekkvina vivjaro li forveturis eksterlanden: kvar jarojn li studis en Romo, en Collegium Nasarenium, kaj du jarojn en Parizo, kie li interkonatiĝis kun Fontenelle kaj Rollin, dank’ al kio li profundigis siajn pedagogiajn kaj filozofiajn sciojn. Tiele li atingis la nivelon de la tiama okcident-eŭropa edukiteco.

Prof. J. Kleiner en sia „Historio de la pola literaturo” karakterizas lin jene: „Li imponis per la nefleksebla konsekventeco, persisteco kaj laboremo, per intelekto universala kaj samtempe praktika, per scio vasta kaj ĝisfunda. Li estis dotita per energio kaj kuraĝo”.

Kiel tridek jarojn aĝa, li revenas la patrujon por servi kaj

labori por ĝi dum kvardek sekvontaj jaroj. Lia programo estis tute konciza laŭ la vortoj, tamen samtempe senlime ampleksa laŭ la enhavo:

„La plena feliĉo de ĉiu socio konsistas en jenaj du premisoj: unue — en la saĝeco de tiuj, kiuj regas ĝin kaj — due: la konforma edukado de la junularo”.

Laŭ tiu ĉi devizo li koncentriĝis sur du ĉefaj agadkampoj: literatura, ĉefe publicista, agado kaj reformo de la lerneja edukistemo.

Lia tutviva agado havis sekve duoblan karakteron: eduk-politikan. Li verkis por eduki politikajn agantojn, kaj samtempe li edukadis junularon por prepari ĝin al la publika servo. Konarski — probable la unua en Pollando — ekkomprenis kaj pruvis tion, ke la eduksistemo estas grava politika instrumento: „Tiaj estos la Respublikoj, kia estas la edukado de la junularo”.

Tamen ne de edukado Konarski komencis sian agadon. Por sanigi la malordon, kiu regis tiam en Pollando, kaj kiun la obskuraj amasoj de la nobelaro nomis: „ora libero”, estis necese kontraŭstarigi al la saksa anarĥio — la Leĝon. Stimulita de J. A. Zaluski, eminenta mecenato de la scienco kaj literaturo, li prenis sur sin la devon eldoni „Volumina legum” (la leĝaron devigan en la Respubliko). Tiamaniere li ekkonis la historian evoluon de la organiza sistemo de la pola ŝtato kaj ekkomprenis, en kiuj direktoj la reformoj estas necesaj. Dum la jaroj 1732—1739 li publikigis 6 volumojn, enhavantaj ne nur la originalajn tekstojn de la leĝoj, sed ankaŭ antaŭparolon kaj komentojn. La unua laboro estis finita, la unua paŝo por ordigi la Respublikon estis farita.

Nova etapo en lia vivo komenciĝas en la jaro 1740. Li fondas en Varsovio — Collegium Nobilium, ekskluzivan lernejon por filoj de la riĉa nobelaro, kiu tiam ludis la decidan rolon en la publika vivo. La komenco estis vere malfacila. En la unua lernojar (1740—41) estis apenaŭ unu lernanto, fine de tiu ĉi lernojar aliĝis pliaj kvin, tamen en la sekvaj jaroj la nombro da kandidatoj ĉiam superis la nombron da lernantoj, kiu estis fik-

PRI „NUDA INTER LUPOJ”

RUDI GRAETZ

LA animskua kaj mondfama romano de Bruno Apitz, kiu aperis jam en multaj lingvoj, nun aperos ankaŭ en Esperanto. Venontjare aperigos ĝin en Germana Demokratia Respubliko konata libroeldonejo.

La romano baziĝas sur faktoj. Pri la enhavo de la libro mi estis tiom kortuŝita kaj ĝi estas skribita tiom ekscite, ke mi legis ĝin preskaŭ senpaŭze dum unu tagnokto.

La aŭtoro priskribis, kion — kiel arestulo — li mem travivis en la koncentrejo Buchenwald. Li kaj aliaj veraj homoj sub la senhomaj kondiĉoj de la faŝisma internigejo, nur per siaj koroj, per siaj nudaj manoj aktive agis por savi la vivon de trijara infaneto; kelkaj kontraŭfaŝistoj eĉ fordonis pro tio sian propran vivon.

Pola judo, arestita de germanaj faŝistoj dum la lastaj monatoj de la dua mondmilito, en kofro portis kun si sekrete knabeton kaj iutage, de alia koncentrejo, kune kun transporto de arestitoj venis kun ĝi en la koncentrejon Buchenwald. Kaj tiam komenciĝis tie — eĉ ĝis la finfina perejo de la 12-jara faŝisma reĝimo — heroaĵoj por savi la infanon el la ungoj de la lupoj. Tiu ĉi heroismo sukcesis savi la vivon de la knabeto. La „koncentreja infano”, Stefan-Jerzy Zweig, antaŭ kelkaj jaroj veninte el Izraelo, nun kiel vivplena juna homo, vizitis la iaman koncentrejon

Buchenwald kaj renkontiĝis kun la aŭtoro de la romano, Bruno Apitz.

Dum la lastaj jaroj, longtempe, mi laboris kun kolego, kiu mem partoprenis la savon de la infaneto. Gardi, nutri kaj prizorgi ĝin en la faŝisma koncentrejo signifis grave endanĝerigi la propran vivon kaj la sekurecon de multaj arestuloj. Sed, ĉu veraj homoj povus lasi tian senhelpan infanon al la brutaj murdontoj? La arestitaj germanaj rezistbatalantoj kontraŭ faŝismon estis tiaj homoj, kiuj ĉiam denove povis kaŝi lastminute la infanon en novaj kaŝejoj meze de la koncentrejo, tiel ke la armitaj faŝistaj lupoj ne povis eltrovi ĝin.

Kaj tamen Buchenwald ne estis ankoraŭ la plej kruela koncentrejo. Ni scias, ke Treblinka kaj Auschwitz en Pollando estis ankoraŭ pli teruraj.

Germanaj arestitaj kontraŭfaŝistoj en somero de la 1942 jaro en Buchenwald komencis organizadon de kaŝaj armitaj grupoj. Per helpo de internacia komitato, fine de marto en la 1945 jaro, ekzistis 178 grupoj kun 850 batalantoj. Ili apartenis al 11 nacioj. Por ne pereji en lasta minuto, necesis memliberigo de la koncentrejo. La 11-an de aprilo en la 1945 jaro la internacia Milita Stabo donis ordonon pri atako kontraŭ la gardejon kaj kontraŭ la koncentreajn barilojn. La arestitoj de Buchenwald sukcesis liberigi sin mem kaj samtempe ankaŭ sian infaneton.

Tiun ĉi interesan kaj ampleksan spirhaltigan majstran romanon tradukis en Esperanton Karl Schulze.

daŭrigo el la 3 paĝo

sita je 60 junuloj. Dum la 16 jaroj, kiam Konarski persone estris Collegium Nobilium, li prilaboris la modelajn instruprogramojn kaj eduksistemon, kiuj ekde la jaro 1754 estis enkonduktitaj en ĉiujn lernejojn de la piordenanoj. Iom poste ankaŭ la jezuitoj devis adapti ilin kun iuj ŝanĝoj. Tiel komenciĝis la granda edukreformo en Pollando, kiun daŭrigis poste la fama Komisiono por la Nacia Edukado.

En kio konsistas la lernejreformo de Konarski?

La organizan formon li transprenis el Collegium Nasarenum, tamen la instruprogramo kaj eduksistemo estas lia propra ideo, kiu originis el komparo de liaj spertoj en la okcidenta Eŭropo kun la polaj lokaj bezonoj. La ĝistiamaj lernejoj de la piordenanoj aŭ jezuitoj edukis antaŭ ĉio fidelajn kaj ardajn katolikojn. La lernejo de Konarski starigis al si la celon eduki homojn klerajn, progesemajn, moralajn, kaj precipe bonajn patriotojn.

Koncize dirite, Konarski: forpelis el sia lernejo la mezepokan

spiriton kaj malfermis ĝiajn pordejn al la progresaj racionalismaj ideoj; limigis la rolon de latino kaj enkondukis la polan lingvon (por renovigi la rilatojn kun eksterlando, li enkondukis ankaŭ fremdajn lingvojn, ĉefe la francan kaj germanan); plivastigis la instruprogramon per novaj lernobjektoj pri la propra lando kaj tiutempa mondo (historio, geografio, matematiko, naturscienco, fiziko, filozofio); politikigis la programon per lernobjekto, kiun oni povus nomi „la sociaj devoj” aŭ „la civitanaj devoj”; reduktis la instruadon de religio kiel lernobjekto (ĝi estis instruata nur en preĝejo post la dimanĉa diservo); la parkeran metodon anstataŭigis per rezonado; racie ligis la instruadon kun gimnastiko, ripozo kaj distro; modernigis la instrumentadojn.

De siaj edukatoj li postulis justecon, amikecon, patriotismon, laboremon, modestecon, devofidelecon. Ĉiu devis preferi la publikan profiton, ol sian propran, ĉiu devis labori por la bono de la patrujo.

La tuta instruprogramo ampleksis 7 parojn. Poŝte tiuj, kiuj intencis labori en la publika ser-

vo, frekventis aldone dujaran kurson pri la juro.

En Collegium Nobilium, kaj poste ankaŭ en ĉiuj piordenanaj lernejoj — ĉio servis al patriota, civitana edukado.

Li komprenis ankaŭ, kiel gravan rolon en la edukado ludas la libroj: „Inter la plej gravaj devoj de la eduksistemo oni metas jenan: la junuloj al kutimiĝu al legado de bonaj libroj”.

Kaj la lernantoj efektive legis bonajn librojn — el eksterlanda literaturo kaj polajn verkojn el la XVI kaj XVII jarcentoj. Krom tio, Konarski turnis specialan atenton al la korekteco de la ĉiutaga nacia lingvo. (Tiun ĉi problemon oni tute neglektadis en la lernejoj dum la lasta jarcento). Jam en la jaro 1741 li verkis la disertacion „De emendandis eloquentiae vitiis” (Pri korekto de la elokventdifektoj). En tiu ĉi verko li deklaris senpardonan batalon kontraŭ la barbarismojn kaj panegiraĵojn en la literaturo kaj ĉiutaga vivo societa, tiel karakterizajn por la baroka erao. Kiel la modelan li montris la stilon de la XVI jarcento, tiun de Kochanowski, Orzechowski, Górnicki kaj Skarga.



La arestuloj malkovris la knabon. Miraklo por ili — sengarda infano en la lupejo...

NUDA INTER LUPOJ

BRUNO APITZ

fragmento

Helpan rolon en la edukado ludis „lernejaj seĝmetoj”. Junaj homoj, laŭ instrukcioj de profesoroj, oratoris pri la plej gravaj aktualaj temoj. Oni nepre devas menci la seĝmeton el la jaro 1759, kiun organizis Konarski mem — je la temo: „De kio dependas la bono kaj prospero de la Respubliko?”

Post la edukreformoj, Konarski tute dediĉis sin al publicista laboro kun la celo aliformi la pensmanieron de la pola nobelaro. Li decidis faligi la „idolon de la ora libero”. La plej danĝera estis ties „favorato” — „liberum veto”, la kutimo, ke en la Sejmo ĉiuj decidoj kaj resolucioj devis esti unuanimaj, sekve — unusola deputito rajtis haltigi, kaj eĉ rompi la debatojn de la Sejmo. Tiu ĉi kutimo estis tiomfoje misuzita, ke dum la lastaj 70 jaroj nur unu Sejmo sukcesis.

„Kiam la Sejmoj neniĝas — skribas Konarski — ĉio sekve neniĝas kaj ruiniĝas. Kio estas la animo en la korpo, tio estas la Sejmoj en la Respubliko”.

Kaj aliloke li aldonas: „Mi scias, ke neniu Sejmo estis rom-

pita pro publika profito, mi scias, ke nur privata profitejo de la aristokrataro, aŭ tiu de la fremdaj frakcioj rompadis ĝis nun ĉiujn Sejmojn”.

Ĉiujn argumentojn kontraŭ „liberum veto” amasigis Konarski en sia plej ampleksa verko, en kvar partoj, publikigitaj sinsekve dum la jaroj 1760—1763 sub la titolo: „Pri efika metodo de la debatoj”. Ĝi estis vere efika. De tiu tempo „liberum veto” formalaperis el la publika vivo.

La lastajn jarojn de sia vivo Konarski dediĉis al moralaj kaj filozofiaj problemoj. En la jaro 1767 li kolektis kaj publikigis siajn lirikajn poeziaĵojn, kiujn li verkis dum sia vivo, sub la titolo: „Opera lirica”. Kvankam ili estas valoraj laŭ la morala kaj eduka vidpunktoj, tamen vera poezio mankas en ili.

Li mortis la 3-an de aŭgusto en la 1773 jaro, en sia sepdektria vivjaro.

Kion li postlasis?

„Vekas admiron la grandeco de lia laboro kaj la atingoj, kiujn li efektivigis — skribas en sia „Historio de la pola literaturo” St. Dobrzycki. — Ne havante en siaj manoj iun ajn po-

LA arboj sur la supro de la Etters-monto gutegis pro malseko kaj senmove altiĝis en la silento envolvanta la monton kaj apartiganta ĝin de la pejzaĝo ĉirkaŭe. Foliaro, elsuĉita kaj detruita de la vintro, humidbrile putris sur la tero.

Nur hezite la printempo suprenvenis ĉi tie.

Tabuloj, starigitaj inter la arboj, ŝajnis averti ĝin.

„Komandanta regiono de la koncentrejo Buchenwald. Atentu, mortminaco! Al pluirantoj oni sen alvoko celpafos!” Sur tio vidiĝis skeletkapo kaj du kruciĝantaj ostoj kiel signo.

La senĉesa pluvo nebula ankaŭ algluiĝis al la manteloj de la kvindek SS-anoj, kiuj staris je tiu ĉi malfrua posttagmezo de marto 1945 sur la betona platformo ŝirmita kontraŭ la pluvo per tegmento. Tiu ĉi platformo, nomita stacidomo Buchenwald, estis la fino de la fervoja trako kondukanta de Weimar al la monto. En la proksimeco troviĝis la koncentrejo.

Sur ties kontrolplaco, vaste etendiĝanta kaj deklivanta norden, la arestuloj jam viciĝis por la vespera kontrolo. Bloko apud bloko, germanoj, rusoj, poloj, francoj, judoj, nederlandanoj, aŭstroj, ĉeĥoj, biblioploruloj, krimuloj... netravedebla amaso, kunkomandita al ekzakte rektigita kvadrato giganta.

Hodiaŭ inter la viciĝintaj arestuloj estis kaŝita flustrado. Iu estis enportinta en la barakaron

daŭrigo sur la 8—9 paĝoj

tencon, nek materialajn rimedojn, li sukcesis atingi ion eksterordinaran: li efektivigis la aliformigon de la socio, kaj pere de tio — li puŝis ĝian historion en nova direkto. En tiu ĉi laboro li ne estis sola, tamen li superis ĉiujn. Li estis unu el tiuj feliĉuloj, kies laboro ne perdiĝas, kiuj propraokule rigardas la riĉan rikolton de siaj penadoj”.

„Kiel Kopernik — ni finu per la vortoj de prof. Wł. Konopczyński — haltigis la Sunon kaj movis la Teron, tiel Konarski ordonis al la individuo turniĝi ĉirkaŭe de la Suno — Nacio, anstataŭ postuli, ke la nacio adaptiĝu al „liberum veto” de la individuo”.

WŁODZIMIERZ ŻYTYŃSKI

LA FRANCA KONTRAŬ LA ANGLAN

La invado de anglismoj en la francan lingvon igis la francan registaron anonci en „Journal Officiel” la decidon, kiu malpermesas al la ŝtato-ficistoj uzi la anglalingvajn esprimojn kaj nociojn

INICIATOJ - IDEOJ - OPINIOJ - KONFRONTOJ

Kun granda interesigo mi tra legis la 5-an numeron de via gazeto. La kovrilpaĝa foto montras la belegan internon de unu el la jam rekonstruitaj ĉambregoj de la Reĝa Kastelo en Varsovio. Mi tre ĝojas pro tiu ĉi fakto kaj same ĝojigis min la tre bela kaj interesa literaturaĵo „La jaŭdaj bankedoj” de Z. Kossak-Szczuka. Ankaŭ la cetera enhavo plaĉis al mi.

Mi vidas, ke „Pola Esperantisto” fariĝas ĉiam pli bona kaj interesa revuo, tamen permesu al mi esprimi kelkajn pluajn rimarkojn pri ĝi. La esperantistoj havas vere multajn kaj malsamajn interesigojn — la enketo tion klare montris — sekve estas nefacile kontentigi ĉiujn. Unu ebleco tamen ekzistas: plioftigi kaj pliampleksigi la revuon tiel, ke sur pli multaj paĝoj estu pli da loko por la diversaj gustoj.

Laŭ mia opinio, „Pola Esperantisto” — cetere kiel ĉiuj aliaj Esperanto-gazetoj — devus havi certan literaturan nivelon, t.e. enhavi valorajn literaturaĵojn kaj tradukitajn el la pola, kaj originalajn, poste seriozan informaron kulture, ekonomian, sciencon, sportan ktp. — pri Pollando, plue priesperantajn artikolojn kaj informojn.

Mi vidis jam multajn malnovajn binditajn jarkolektojn de plej diversaj Esperanto-revuoj, kaj ĉiuj havas ion komunan: se la revuo enhavis literaturajn tekstojn, tiam ĝi estas leginda eĉ nun, post multaj jardekoj, sed se la revuo estis sen legaĵoj, nur simpla informilo — kaj tiaj bedaŭrinde estis kaj estas iuj Esperanto-gazetoj — nuntempe ĝi estas senvalora por normala esperantisto, ĝi prezentas nur muzeaĵon taŭgan por Esperanto-historiisto.

Vere terura ŝajnas al mi la nesubskribita opinio pri „Pola Esperantisto” en la 4-a numero, la unua nigra teksto post la ruĝa. Ĉu oni ĉiam opinias, ke Esperanto estas nura 800-vorta simpla lingvo, kaj ĉiu 801-a, 802-a ktp. vortoj prezentas gravan malfaciligon de la lingvaĵo? Por la komencantoj povas esti destinitaj unu-du paĝoj (bonega kaj daŭrigenda estas la „Paĝoj por la kursanoj”), sed la cetera teksto devas esti altnivela, do neniun simplaĉan primitiv-lingvo.

Priesperantaj tekstoj estas tre gravaj; precipe mi iam ŝatis „Sur nia herbejo” kaj „Razindaj ideoj”, sed mi opinias, ke iuj el la artikoloj pri la aktivecoj de unuopaj kluboj, k.s., estas tro multvortaj kaj kompare kun la vera enhavo tro

longaj; plia koncizeco ne malutilus. Por ekzemplo mi volas citi la artikolon pri la XII Konferenco de Esperanto-Instruistoj en Pollando en la 3-a numero (p. 7): ĝi enhavas la historion ekde 1957, poste longan paroladon pri la konferenco (mankis sole informo pri tio, kie la konferencanoj dormis kaj ĉu la manĝoj estis bongustaj), poste priskribo de la Esperanto-Muzeo en Sopot, cetera interesa kaj gratulinda, sed fine estas nur la titoloj de la prelegoj de la konferenco, kvankam ĝuste tie ĉi devus esti almenaŭ koncizaj resumoj de la prelegoj kaj konkludoj de la prelegintoj.”

JIRI PATERA

ESPERANTO SAMRANGA KIEL LA NACIAJ LINGVOJ?

Se vi deziras, ke la enhavo de tiu ĉi titolo estu iam atingita, mi apelacias al tiuj esperantistaj medioj, kiuj estas en la urboj, kie agas Polskie Towarzystwo Neofilologiczne (Pola Novfilologia Societo), ke esperantistaj aktivuloj provu kunlaboron kun la Societo, kreante apud sekcioj de la angla, franca, germana kaj rusa lingvoj — ankaŭ sekcion de Esperanto, kiel faris la esperantistoj en Szczecin.

Do, la unua paŝo estas jam farita de ni, ĉar por krei la sekcion ni devis ricevi permeson de la Ĉefa Estraro de la Pola Novfilologia Societo en Poznań (tie estas la sidejo), kiu akceptis Esperanton kiel egalrajtan sekcion samrange kun tiuj de la naciaj lingvoj supre menciitaj. Kaj de ni, esperantistoj, dependas, ĉu ni estas kapablaj montri la valoron kaj samrangecon de Esperanto rilate al la aliaj lingvoj aŭ ne. Nia sekcio provas tion fari jam dum unu kaj duona jaro. Kiu estos la sekva?

Al la sekcio devas aliĝi almenaŭ 10 personoj (prefere filologoj, sed ne nur), kiuj deziras pliprofundi la lingvoscion, ekoni la mondan literaturon, la disvolvigadon de la lingvo kaj tiel plu.

Se vi bezonas pli precizajn informojn aŭ estas preta prelegi en nia sekcio, aŭ ion proponi, estu afabla skribi al la adreso: Miłoslawa Kolińska, Szczecin, ul. Sopocka 2/2.

IMITINDA EKZEMPLO

Dank’ al inĝ. Jan Werner, atingis nin kelkaj lastaj numeroj de la bulteno „Teknikista Sekcio Informas”, eldonata de la Teknikista Sekcio de la Ĉeĥa Esperanto-Asocio. La enhavo rekte surprizis min. Surprizis pozitive. Sen fari bruon, tre konsekvente, laŭ konkreta laborplano, la Sekcio disvolvas ege utilan fakan laboron, por kiu la gvidantoj de la Sekcio pli kaj pli akiras kunlaboron de alilandaj fakuloj — esperantistoj.

La Teknikista Sekcio, kiu funkcias de post la 1969 jaro, nombras 40 membrojn. Aktuale oni laboras super „Centra Teknika Sliparo” ĉeĥa-esperanta kaj inversa, kiu antaŭpreparos grandan teknikan vortaron ĉeĥan-esperantan. Oni ankaŭ tradukas kaj aperigas multobligite sciencajn disertaĵojn aŭ originale verkas tiajn. Inter aliaj menciindas la fakverko de d-ro inĝ. Miroslav Tuma el Brno — „Fundamentaj konsideroj de la scienco pri varmo”. Tiu ĉi 200-paĝa verko estos aperigita helpe de la Ĉeĥa Esperanto-Asocio.

La Teknikista Sekcio dediĉas multan atenton al la terminologia kaj lingvonormiga laboro, dezirante per tio ĉi krei kondiĉojn por pli vasta eldonado de faka literaturo. En laŭvicaj numeroj de la bulteno oni diskutas novajn Esperanto-terminojn, fakajn esprimojn kaj fakajn frazeologiaĵojn, traktante parton el ili kiel „provdalonojn” antaŭ oficiala uzo en la fakverkoj. Inter la terminaroj aperigitaj en la bulteno menciindas „Aŭtomobilista vortareto” de inĝ. Aleš Bednařík kaj „Matematika vortareto” de la sama aŭtoro.

Entute kaj resume: estus dezirinde, se la ekzemplon de la ĉeĥaj teknikistoj sekvus ankaŭ fakuloj en aliaj landoj, ĉar tiaspeca agado naskos fruktojn nur tiam, kiam ĝi estos gvidata paralele kaj internaciskale.

(An-Pe)

MOSKVAJ SCIENCISTOJ PROPONAS ESPERANTON

Fine de oktobro 1972 okazis en Moskvo scienca konferenco pri naturaj kaj artefaritaj lingvoj. Komuna platformo por la diskuto estis la konstato, ke pro la nombra kresko de la oficialaj lingvoj ĉiam pli malfacila fariĝas la tutmonda interkompreniĝo, kio speciale reflektiĝas en la malfacilaĵoj de la internacia scienca kunlaboro. Grupo de lingvistoj, filologoj, matematikistoj pridiskutis do la problemon.

INICIATOJ - IDEOJ - OPINIOJ - KONFRONTOJ

Magomet Isajev, supera scienca kunlaboranto de la Lingvo-scienca Instituto en Moskvo prezentis pledon por Esperanto, aludante al la tezo de prof. E. Bokarev, ke unu afero estas tiu de helpa internacia lingvo, kaj tute alia afero estas iu estonteca tutmonda lingvo, pri kiu nun nenion konkretan oni povas diri. Akcepto de nacia lingvo kiel internacia, laŭ multaj parolantoj, ne eblas, ĉar sovetaĵoj esploroj staras sur la lenina pozicio: nenion avantaĝon por ajna nacio kaj ajna lingvo nacia.

Dum la konferenco oni prezentis ankaŭ referatojn pri „internacia lingvo por la komputila komunikado”. Ĉi-koncerne interesan opinion esprimis d-ro N. Andrejev, kiu prognozas, ke komuna lingvo por la komputiloj iam transformiĝos en homan interkompreniĝilon por la tuta homaro. Tiun ĉi opinion kontestis Magomet Isajev kaj prof. Vasiljev, substrekante, ke internacia lingvo, nome Esperanto, jam ekzistas, kaj logika komunikilo por la komputiloj estas aparta problemo. Prof. D. Armand proponis — en ligo kun la malfacilaĵoj en la internacia scienca komunikado — komence enigi Esperanton en la formo de resumo en naciaj sciencaj revuoj, kaj estonte konservi la naciajn lingvojn por la esploroj havantaj nur la enlandan signifon. Ĉion ceteran publikigi en Esperanto, kio forte antaŭenpuŝus la evoluon de la sciencoj.

La moskva konferenco de sciencistoj pri internaciaj lingvoj montris almenaŭ unu avantaĝan fenomenon: nome, ke Esperanto estas serioze konsiderata kaj fariĝas objekto de esploroj kaj diskutoj en la soveta scienca medio. Estus dezirinde, ke en aliaj landoj okazu same.

La raporton pri la konferenco en Moskvo ni ricevis de nia korespondanto, ĵurnalisto kaj literaturisto soveta, Aleksandr Ĥarkovskij, al kiu ĉi-loke ni esprimas dankon.

MARIUSZ DASTYCH

25 JAROJ DE „WIEDZA POWSZECHNA”

2360 librojn en la eldonkvanto de 44 milionoj da ekzempleroj aperigis ĝis nun la eldonejo „Wiedza Powszechna” (Scio por Ĉiuj) en Varsovio, kiu la 7-an de decembro 1972 solenis la Jardekkvinon de sia agado. La specializo de tiu ĉi eldonejo, kies libroj 80-procente estas popularsciencaj, estas ankaŭ publikigado de lernolibroj kaj vortaroj de fremdaj lingvoj. Kaj en tiu ĉi sfero „Wiedza Powszechna” ĉiam pli ofte konsideras la bezonojn

de la pola Esperanto-movado, aperigante jen lernolibrojn, jen vortarojn; baldaŭ ĝi ankaŭ publikigos Esperanto-konversaciojn por turistoj. En la lastaj 15 jaroj la eldonejo aperigis librojn de 7 esperantistaj aŭtoroj, inter kiuj unu libro — „La vivo de la plantoj” de Paul Neergaard — aperis pollingve, tradukite el Esperanto.

La Esperanto-eldonaĵojn de „Wiedza Powszechna” inaŭguris en la 1959 jaro la libro de Maria Ziolkowska „Doktoro Esperanto” — biografio romano pri Ludoviko Zamenhof, kredeble bone konata al niaj legantoj. Kaj nun estas ĝuste presata la oka Esperanto-libro, kaj nome: „Esperanto-konversacioj” por turistoj, kiu aperos en majo de la nuna jaro. En la komenco de la 1974 jaro „Wiedza Powszechna” presigos la naŭan Esperanto-libron. Ĝi estos nova, ampleksa vortaro „Esperanta-pola” de Tadeusz Michalski, bone konata pola Esperanto-vortaristo. Ankaŭ en la venonta jaro la eldonejo presigos novan, pli ampleksan vortaron „Polan-esperantan” de Kazimierz Tyminski.

Kiel vi do povis orientiĝi, la meritoj de „Wiedza Powszechna” estas grandaj. Ni povas kredi, ke en la proksimaj jaroj ili ankoraŭ kreskos, ĉar la gvidaj redaktoroj de la eldonejo montras simpatian al nia lingvo.

La jubilea festo de „Wiedza Powszechna”, kiun kronigas granda ekspozicio de ĉiuj ĝisnunaj eldonaĵoj, estas ankaŭ festo por ni, esperantistoj.

PRI LA TELEVIDA KURSO EN BRATISLAVA ESPERANTO SUR BILDEKRANO

Guplenajn tagojn pasigis en la televida stacio apud Bratislava la recenzista kolektivo de AE SSR kun ĉefredaktoro J. Pavlec kaj liaj stabanoj, kiu spektis la tutan TV-kurson antaŭ ĝia publika apero. Por ĈEA partoprenis la projekciadon komitatano O. Knichal, anstataŭante la prezidanton J. Vitek.

Pretigo de la 17-leciona kurso estas frukto de dujara sindona kaj streĝega laboro de ties ĉef-aŭtoro Pavel Rosa kaj de iliaj oferemaj kunlaborantoj en la Slovaka Televido. La redakcio de klerigaj programoj bonege komprenis la unikan rolon de Esperanto, prenante sur sin la taskon fari el ĝi efikan komunikilon ankaŭ sur tiu ĉi kampo, eksterordinare grava en la epoko de la scienc-teknika revolucio — ne domaginte elspezojn. (Ĉiu

leciono kostis 200 mil kronojn!).

La kurso — entute la unua en la socialismaj landoj — estas senprecedenca ne nur laŭ sia baza destino, sed ankaŭ laŭ vidpunkto teknika. Kun inventemo estis aplikitaj pluraj dialogoj intermiksitaĵoj kun interesaj scenoj el diversaj medioj. Instrudona ekspliko de gramatikaj reguloj kaj bona elparolo de la rolantoj ankaŭ faras tiun ĉi kurson modela.

La kurso eniros la 2-an programon de la Slovaka Televido fine de marto aŭ komence de aprilo, ĉiujaŭde inter la 19 kaj 20 horo. Dum la lasta jarkvarono ĝi enviciĝos en la 1-an programon, t.e. por la tuta teritorio de SSR, kun ripetitaj elsendoj.

La filmo estas produktita por spektantoj en Ĉeĥoslovakio, sekve ankaŭ la ĉeĥa esperantista movado klopodos persvadi la televidon en Praha, ke ĝi laŭ siaj eblecoj transprenu la filmon, pri kiu jam montris intereson ankaŭ eksterlandaj Esperanto-organizaĵoj. La slovaka televido intencas prezenti plurajn filmojn el socialismaj landoj en Esperanto-versio kaj ankaŭ estonte popularigi nian kulturon pere de Esperanto.

(laŭ „Starto”, 1/31/ 1973)

LINGVA RUBRIKO

Kiam mi legas informilon pri „Internacia Ferio”, kiu daŭros du semajnojn, mi havas la impreson, ke la aŭtoro de ĉi tiu informo tute ne komprenas la signifon de la vorto „ferio”. Kun bedaŭro mi konstatas, ke tia erara uzo de la vorto „ferio” lasttempevastiĝis.

Laŭ PIV, FERIO estas „libera tago, dum kiu oni rajtas ne labori”. Kaj do temas pri UNU, mi ripetas — UNU tago. Kiam temas pri plurtaga aranĝo, oni devus memkompreneble uzi la pluralon — ferioj. En PIV troviĝas ekzemploj: „kiam komenciĝos viaj ferioj?”; „la someraj, vintraj, lerneaj ferioj”. La afero estas do tute klara, ĉu?

„Ferii” laŭ PIV estas „ĝui ferion”, tio signifas „ĝui liberan tagon, dum kiu oni ne laboras”. Laŭ mia opinio, tiu ĉi difino devus esti iom pli vasta: „ĝui kaj pasigi ferion”. „Mi ferias” — laŭ mia opinio, signifas: „mi ĝue pasigas la liberan tagon, dum kiu mi ne laboras”.

El la vorto „ferio” oni povas krei derivaĵojn, kiel: „feriado”. Kaj mia opinio ĝuste tiu ĉi derivaĵo estas tre taŭga por nomi plurtagan aranĝon, dum kiu oni ferias, kaj do „Internacia Feriado”, aŭ prefere „Internacia Esperantista Feriado”.

(An-Pe)

daŭrigo el la 5 paĝo

la sciigon, ke la usonanoj jam transpasis Rejnon apud Remagen...

...Post kiam SS formis el la aro marŝkolonon, tiu — eskortata de la sovaĝa hordo — ŝancele-vertiĝe ekmoviĝis direkte al la barakaro.

Jankowski sukcesis glitrapidi en la mezon de la marŝvico kaj tielmaniere li evitis la batojn de la draŝanta SS. Neniu en la kolono zorgis pri sia apudulo. Ĉiu estis plena de sia propra zorgo pro la necerto atendanta ilin. La malsanuloj kaj elĉerpitoj estis kuntrenataj el la kutimo de bestiginta konservinstinkto. Tiel la kolono ŝanceliĝis laŭ la alirstrato kaj tra la pordego en la barakaron.

La mano de Jankowski, sentigita per la bato, pendis de la artikolo kvazaŭ io fremda kaj malamika, ĝi doloris terure. Sed pro la atento, kiun li devis turni al sia kofro, Jankowski apenaŭ sentis la doloron. La tasko estis, ĉiuokaze, porti la kofron sendanĝere tra la pordego de la nova barakaro.

Per viglaj okuloj Jankowski esploris ĉirkaŭ si. En la interpremigo li igis sin ŝovi tra la mallarĝa pordego. Lia sperto helpis al li kaŝi sin tiel lerte, ke li kune kun la aro neĝenate kirliĝis en la barakaron, ne tirante sur sin la atenton de SS.

Estis miraklo, ke li fakte sukcesis alporti la kofron ĝis ĉi tie. Jankowski tremante rifuzis ĉiujn pensojn por ne fortimigi la miraklon. Nur unu aferon li arde kredis. La kompatema Dio certe ne permesus, ke la kofro falos en la manojn de SS. ...

... „Kiu vi estas?” demandis Hoefel. „Nomo, nomo”.

Tion la polo ŝajnis kompreni. „Jankowski, Zacharias. Varsovio”.

„Ĉu tio estas via kofro?”

„Tak, tak”.

„Kion vi havas en ĝi?”

Jankowski parolis, gestis kaj ŝirmante tenis la manojn super la kofro.

La rotestro kuregis el la banejo kaj kun malbenoj pelis la homojn antaŭ si. Por ne frapi lian atenton, Hoefel ŝovis la polon en la vicon de la nuduloj. Jankowski ĝuste falis en la manojn de la rotestro. Tiu prenis lin je la brako kaj ĵetis lin en la banejon.

Do Jankowski devis eniĝi en la kuvon kaj poste estis premata de la timeme interpremiĝantoj en la banĉambro.

La humida varmo bone efikis sur lian trafrostitan korpon kaj sub la duŝilo Jankowski fariĝis agrable senvola. Streĉiteco kaj timo foriĝis kaj la haŭto avide ensuĉis la varmon...

...Pippig sciivole kaŭriĝis malsupren kaj malfermis la kofron. Sed tuj li klakfermis la kovrilon kaj konsternite rigardis supren al Hoefel.

Pippig denove malfermis la kofron, sed nur tiom, por ebligi enrigardon al Hoefel, kiu jam klinis sin.

„Homo, malfermu!” ĉi tiu silbis, rapidege rektigis sin el la klinita pozicio kaj timeme ĉirkaŭrigardis al la rotestro. Tiu ĉi estis en la banejo.

„Se tiuj malkovros tion...” — flustris Pippig.

Hoefel nepacience mangestis. „Forprenu! Kaŝu! Rapide!”



Kvazaŭ ŝtelisto Pippig strabis al la banejo, kaj kiam li estis certa, ke oni lin ne observas, li haste kuris kun la kofro al la ŝtonkonstruaĵo kaj malaperis...

...Kvazaŭ knabo feliĉa pro donaco, Pippig suprenrapidis kun la kofro la ŝtuparon al la privatajdeponejo.

Je la malfrua posttagmeza horo neniu arestulo de la taĉmento plu restadis en la longe etendiĝanta vestejo, en kiu pendis miloj da sakoj kun civilvestaĵoj. Nur la jam nejuna August Rose staris ĉe la longa transversa tablo kaj traserĉis iujn paperojn.

Li mirigite rigardis al la enŝteliĝanta Pippig.

„Kiion vi do alportas?”

Per rapida mangesto Pippig flankenŝovis la demandon.

„Kie estas Zweiling?”

Per la dikfingro Rose montris al la ĉambro de la rotestro.

„Atentu”, Pippig haste diris kaj rapide glitiris malantaŭen en la duonluman vestejon. Rose postrigardis lin kaj poste observis la ĉefrotestron videblan tra la granda vitra fenestro en la ĉambro.

Zweiling sidis ĉe la skribotablo antaŭ la malfermita gazeto, apogante la kapon sur la manoj. Li aspektis, kvazaŭ li dormus. Sed la sengrasa, longkrura homo ne dormis, sed cerbumis. La lastaj raportoj de la fronto maltrankviligis lin. Pippig revenis antaŭen, faris trankviligan geston en la direkto al Rose, brue malfermis la pordon al la skriboficejo situanta apud la ĉambro de Zweiling, kaj laŭtege kriis:

„Marian, venu kun mi malsupren por interpreti!”

Zweiling timigite ekatentis. Li vidis la polon vokitan eksteren foriri kun Pippig.

Tiu donis al Kropinski rapidan signon kaj ambaŭ ŝteliris malantaŭen. En la plej eksterma angulo de la vestejo ili malaperis post aktecaj staploj da vestosakoj kaj vestaĵoj de mortintaj arestuloj. Tie ĉi staris la kofro.

Pippig, hidrangece kondukanta kaj ekscitita, kun longe etendita kolo, ankoraŭfoje suspekteme flaris ĉirkaŭ la staploj, frotis siajn manojn kaj rikanis al Kropinsky, esprimante: Nun atentu, kion mi kunportis... Tiam li malfermante klakigis la serurojn kaj levis la kovrilon de la kofro. Larĝkrure li ŝovis la manojn en la poŝojn kaj ĝuis la sukcesintan surprizon.

En la kofro kuŝis infano, kurbiĝinta en si, premanta la manetojn antaŭ la vizaĝo, volvita en ĉifonojn, knabo, havanta ne pli ol tri jarojn.

Kropinski kaŭriĝis kaj fikse rigardis la infanon. Tiu ĉi kuŝis senmova. Pippig karese glitigis la manon super la malgranda korpo. „Kateĉjo. Alkuris al ni”.

Li volis turni la infanon je la ŝultro, sed tiu ĉi ŝajnis kontraŭstari. Fine Kropinski trovis vorton. „Mizera vermo”, li diris pole, „de kie vi venis?” Aŭdante la polajn sonojn, la infano antaŭenŝovis sian kapeton kvazaŭ insekto eltirinta la palpilojn. Malforta, unua manifestiĝo de la vivo, tiel ege ekscitanta por la du, ke ili fascinite gapis en la okulojn de la infano. La mallarĝa vizaĝo jam havis la seriozecon de scianta homo, kaj en la okuloj kuŝis brilo tute ne plu infana. La infano rigardis la virojn en muta atendo. Ili apenaŭ kuraĝis spiri.

Rose ne plu povis rezisti kontraŭ sia sciivolemo. Mallaŭte li ŝteliris en la angulon kaj subite staris antaŭ la du.

„Kion do tio ĉi signifas?”

En ega ektimo Pippig sin turnis abrupte kaj siblis al la miranta Rose:

„Ĉu vi estas freneza? Veni ĉi tien! Tuj reiru antaŭen! Ĉu vi volas, ke Zweiling nin surprizu?” Rose trankvilige mansignis. „Li ja revas antaŭ si.”...

...La infano sidis rekte en la kofro, kaj Kropinski, genuanta antaŭ ĝi, provis paroligi ĝin.

„Kiel vi nomata? Vi diru al mi. Kie estas paĉjo? Kie estas panjo?” Hoefel alpaŝis. Pippig senhelpe flustris:

spirite diris. „Mi alportos ion al ĝi”.

Hoefel rektigis kaj profunde spiris. La tri senhelpe rigardis unuj la aliajn. Hoefel maltrankvile ŝovis la ĉapon el sia frunto.

„Jes... jes ja — ...kompreneble...”

Pippig opiniis tion ĉi konfirmo de sia intenco kaj volis forrapidi. Sed per la sensencaj vortoj Hoefel nur provis esprimi sin kaj ordigi la vagantajn pensojn. Kion fari pri la infano? Kien ĝi? Provizore ĝi supozeble devas resti

nere skuis ĝin. „Vi ne devas krei, ĉu vi aŭdas? Alie venas SS”. Subite la vizaĝo de la infano terure ŝanĝiĝis. La knabo deŝiris sin, rejetis sin en la kofron kaj tute kurbiĝis, kaŝante la vizaĝon en la manoj.

„Gi estas informita”, elpuŝis Pippig.

Por kontroli sian supozon, li klapfermis la kovrilon. Ili aŭskultis. En la kofro estis silente.

„Nu, klare”, Pippig ridetis. „Gi estas informita”.



Hoefel, la blokestro, en rigora pridemandado. De lia sinteno multo dependas, la sekureco de la arestuloj, de la infano...

„Kion nun fari pri la infaneto! Se ili kaptos ĝin, ili batmortigos ĝin”.

Hoefel rektigis kaj profunde rigardis en la vizaĝon de la infano.

„Gi ne paroli”, malespere diris Kropinski.

La fremda viro ŝajnis maltrankviligi la infanon, ĝi tiris je sia ĉifonita jako, kaj ĝia vizaĝo restis strange rigida. Ŝajne ĝi ne sciis, kio estas ploro.

Hoefel firmtenis la nervozan maneton.

„Kiu do vi estas, etulo?”

La infano movis la kapon kaj glutis.

„Malsata ĝi estas” Pippig in-

ĉi tie. Hoefel retenis Pippig kaj pripensis.

„Preparu por ĝi kuŝejon”, li instrukiis al Kropinski.

„Prenu kelkajn el la malnovaj manteloj, metu ilin tie en la angulon kaj...” Li ĉesis.

Pippig demandante rigardis lin.

En la vizaĝo de Hoefel subita ektimo esprimiĝis. „Sed se la infano krios ...?”

Hoefel premis la manon al la frunto.

„Malgrandaj infanoj timas kaj tiam ili krias... Malbenite do...!” Li fikse rigardis la infanon. Longe. „Eble... eble ĝi tute ne kapablas krei...?” Li prenis la infanon je ambaŭ ŝultroj kaj te-

Li denove malfermis la kofron, la infano intertempe ne moviĝis. Kropinski levis ĝin, kaj ĝi pendis inter liaj manoj kvazaŭ kurbiginta insekto. Konsternite la tri rigardis la strangan estaĵon. Hoefel deprenis la infanon de Kropinski kaj ekzamenante turnis ĝin tien kaj reen. Altirinte la krurojn kaj kapon kaj preminte la manetojn antaŭ la vizaĝo, la infano ŝajnis kvazaŭ tuj eltirita el la patrino ventro aŭ kvazaŭ skarabo ŝajniganta mortintan. Emociita Hoefel redonis la estaĵon al Kropinski. Tiu ĉi premis ĝin al si, flustrante al ĝi trankviligajn vortojn polajn...

BRUNO APITZ

Kien evoluas la homo

BARTOSZ MILEWSKI



Ĝis antaŭ nelonge la scienco kaj la tekniko ne havis praktike iun ajn influon sur la sorton de la homaro. Nur en la lasta jarkvindeko okazis radikalaj ŝanĝoj ĉi-rilate, do ne estas sence prikonsideri la futuron de la homaro el la vidpunkto de la scienc-teknika revolucio. Eĉ tiuj sferoj de la homa agado kiel sociologio, ekonomio kaj politiko bezonas enpenetron de la scienco. La bone stabiliĝanta kaj memkoretiĝanta modelo de la soci- kaj ŝtatfunkciado estas necesa por la mondo. La ĝisnunaj modeloj estas jam tro malnoviĝintaj kaj ne plu adapteblaj al la periodo de la scienc-teknika revolucio. La sistemo de la funkciado de la sociaj organoj ne baziĝas sur la sciencaj principoj, kaj la sciencon ĝi volas utiligi nur por la konsumaj kaj militaraj celoj (Prof. Józef Werle — „Rozwój i rola fizyki w przyszłości”; „La evoluo kaj rolo de la fiziko en la estonto”). Sed niaj interesiĝoj penetras pli profunde en la estonton — temas pri la problemo de la homesteco mem. La problemo estas tute nebanala, se oni prikonsideras la jam baldaŭajn eblojn de memevoluo de la homa gento. Ni rimarku la interesan fakton, ke la biologia evoluo — kun sia milionjara temposkalo ne sukcesas efektive kontribui al la civiliza evoluo. La necivilizita homo el la ŝtonepoko biologie identas kun la homo nuntempa, disde kiu fordividas lin la intelekta abismo de la tuta kulturo kaj civilizo. Tio ĉi rezultas simple el la nekomparebleco de la temposkaloj de la biologia kaj teknika evoluo. Do, la instrumenta rimedstoko por la memevoluo estos akirita pli frue, ol la naturo mem kapablos ŝanĝi ion ajn en ni mem. Se ni jam estos disponantaj pri tia tekniko, nenio haltigos nin pli-bonigi la homon.

Oni devas diferencigi du etapojn de la memevoluo. La unua estas la genetika inĝenierio. Nunmomente la heredmekanismo ne estas ekkonita ĝisfunde, ni tamen kredas, ke la plua progreso de la scienco ne nur ebligas al ni tute ekkompreni la genetikan kodon, sed ankaŭ reguligi kaj ŝanĝi la genotipon de la homo. Tio permesos al ni fabriki ulojn sanajn, fortajn, kaj eĉ geniajn. Tiam do ne blinda hazardo decidos pri la kapabloj kaj aspektoj de unuopuloj, sed racia planado de inĝeniero-genetikisto.

Kiuj el la gepatroj ne volus certigi al siaj infanoj sanon kaj inteligentecon kaj tiele pli bonan vivstar-ton? Ĉu tio ĉi ne estas natura kontinuiĝo de la famiplanado? Laŭ la morala aspekto, pli senhumanece estus ne sekvi la eblojn kaj naski infanojn misevoluontajn, malsanemajn, aŭ eĉ lamajn, da kiuj sufiĉe granda procento okazas ĉe la spontana nasko. Kompreneble, kiel ĉe aliaj teknologioj, ankaŭ ĉi-koncerne eblas certaj deviacioj (kiel rimarkis jam Huxley en „Nova bonega mondo”), sed ni ne devas rezigni pri tiuj ĉi atingiĝoj nur pro tio, ke — malĝuste utiligitaj — ili povas damaĝi (oni ne malpermesas sin razi, kvankam oni povas tranĉvundi al si la gorgon).

La sekva grava paŝo al memevoluo estas genotipigo de la kulturo. Kiel oni scias, la genotipo — alivorte la recepto, kiel fabriki organismon — estas precize apartigita disde la cetero de la organismo. La ecoj akiritaj genotipe ne estas heredotaj. Tial do la suĉinfano forigita de la kultura formacio, en kiu ĝi naskiĝis, ne kreas kulturon, sed besteskiĝas, perdante eĉ la kapablon paroli. Oni devus minimume prikonsideri la eblon enkomponi en la genetikan kodon certajn elementojn de la kulturo kaj almenaŭ de la lingvo, skribo kaj bazaj principoj de la natursciencoj. Realigante ĉi tion oni devas atenti, ke la ŝanĝo ne estu desupra limigo, t.s. ke ĝi ebligu disvolviĝon de la kulturo antaŭen, tamen ĝi defendu antaŭ malantaŭeniro — antaŭ besteskiĝo.

La dua etapo de la memevoluo estas ciborgizo. Oni rimarku, ke la antaŭe sugestitaj konstruŝanĝoj de la homa organismo ne tuŝas ties ĝeneralan — biologian planon. La albumena konstrumaterialo grandskale determinas la ecojn de la organismo (mi pensas pri la manieroj de nutrado, spirado, moviĝado, plimultiĝo kaj pri la energetiko, ktp.). La evoluo, limigita de la komenckondiĉoj, ellaboris tiun kaj ne alian vivmodelon kaj ĝi ne povas fari tiel profundajn ŝanĝojn, kiujn

LINGVA AVENTURO

(aŭ: lernu Esperanton)

STEFAN BENTKOWSKI

Kristina estis studentino de universitato. Ŝi devenis el provinco, ŝiaj gepatroj estis sufiĉe riĉaj kaj por la amata solfilino ili luis kvankam modestan, sed tamen apartan ĉambreton ĉe iu maljuna vidvino, sinjorino Natalia, „por ke Krinjo havu prizorgon”.

Hazarde ĉe la sama sinjorino Natalia prenis similan ĉambreton Tadeo, kun nur tiu diferenco, ke je la alia flanko de malgranda koridoro. Tadeo estis studento de la kvara kurso de politekniko, ĉe sinjorino Natalia li loĝis jam de kvar jaroj, kaj al la malgranda Krinjo li rigardis malrespekte kaj kun la sento de supereco pro la trapasita studenta staĝo.

Sed nur komence. Iom post iom lia malvarma rilato al Kristina fariĝadis ĉiam pli varmota tiel, ke post unu jaro de la najbara loĝado ĝi ŝanĝiĝis en firman simpation. Ili kune vizitadis teatrojn kaj kinejojn, kune tagmanĝis kaj dufoje en semajno ili kune partoprenis esperantan kurson, instigitaj de iu asistanto de altlernejo.

*

Estis sabato, sabato karnavala, kaj vespere estis okazonta studenta balo. Kristina jam delonge estis preparanta novan eksterordinaran robon kaj dum la kudrado ŝi ridetadis al si mem je la penso, ke ŝi tute certe prisorĉos per ĝi Tadeon.

Sed neatendite, unu tagon antaŭ la balo, ŝia palpebro komencis juki kaj poste ĉiam pli ŝveli. Helpis nenio, nek la ofte ŝanĝitaj kompresoj, nek medikamentaj rimedoj. Formiĝis hordeolo. La plensvelinta palpebro misformis la esprimon de la vizaĝo kaj malobligis koketajn alrigardojn.

Tadeo koleregis kaj li ankaŭ mem volonte rezignus pri la balo, sed li devis iri, akceptinte en la unua skipo duhoran deĵoron en la bufedejo. Sed la vizaĝon li havis malbonaspektan kaj fininte la deĵoradon li ne partoprenis en la ĝenerala amuziĝado, sed li vagis sencele tra ĉiuj salonegoj.

— Tadeo! Kio estas al vi? — demandadis kolegoj.

— Mia dento doloras terure — li respondadis malvolonte.

— Kaj kiu? La vanga aŭ la stranga? — ili moketis ridetante.

Kun malbona humoro Tadeo atingis la pordon de sia loĝejo, forlasinte la balon baldaŭ post la nokto-mezo. Li serĉis, serĉadis en ĉiuj poŝoj — vane, la ŝlosilon li ne kunhavis. Kion fari? Reveni al la bal-salonego estis ja neeble, kaj dum la frosta nokto vagadi tra la stratoj ĝis la mateno — li ne emis.

Li decidis frapi al la pordo. Tio ja ne ĝenos la duon-surdan sinjorinon Natalia, kaj Kristina havas sian ĉambreton apud la pordo. Do li frapis unu fojon, poste la duan kaj la trian. Post iu momento li ekaŭdis malantaŭ la pordo iun susuron kaj poste la voĉon de Kristina, akran kaj iel ŝanĝitan:

— Kiu estas tie?

— Mi, Tadeo. Malfermu, mi petas. Mi forĝesis la ŝlosilon.

— Kiu Tadeo?

— Nu, Tadeo.

— Mi konas neniun Tadeon. Kion vi volas?

— Ne ŝercu, Kristina, sed malfermu. Estas mi, Tadeo. Ni loĝas ja kune.

— Kiel? Kune? Mi loĝas kun neniuj, sed aparte.

— Sed vid-al-vide al mi. Mi loĝas je la dekstra parto de la koridoro, kaj vi je la maldekstra.

— Je la maldekstra? Ho, jen la mensogo evidentiĝis! Mi tenas ĝuste la anson de mia ĉambro dekstramane, do mi havas la mian je la dekstra flanko.

— Sed turnu vin, tiam vi havos la ĉambron maldekstraflanke.

— Kion? Turni min? Por ke vi batu min per bastonego de malantaŭe?

— Kiel mi povus bati vin, se la pordo estas fermita?

— Ne estu tiel saĝa! Sed, se vi asertas, ke vi estas Tadeo, pruvu tion kaj diru, kio estis hodiaŭ en nia manĝejo por la tagmanĝo?

Tadeo sulkigis la frunton, kuntiris la brovojn kaj streĉis la memoron. Fakte, kio povis esti en la manĝejo por la tagmanĝo. Grisupo, tomata supo aŭ legoma supo, krome terpomoj kaj betoj aŭ brasiko kun kotleto aŭ gulaŝo. Sed diveni trafelekte estus sence.

Tadeo malrapide descendis tra la ŝtuparo ion murmurante sub la nazo. Subite li frapis sin sur la frunton, li returnis sin, rapide kuris supren kaj energie frapis la pordon. Li ekaŭdis la voĉon de Kristina:

— Ĉu ree frapas vi? Foriru tuj, alie mi alvokos milicon!

— Ĉu vi parolas esperante?

— ???

— Diru, ĉu vi parolas esperante?

— ???

— Ĉu vi partoprenas la kurson, kiun gvidas sinjoro Pettyn?

— Jes.

— Ĉu tio ĉi estos sufiĉa atesto, ke mi estas Tadeo, se mi diros, kion li instruis dum la lasta leciono?

— Estos.

— Do, li diris pri la uzado de la akuzativo kaj interalie li klarigis la diferecon inter „venu al mi” kaj „venu ĉe min” kaj ankaŭ ...

Pliajn argumentojn de Tadeo interrompis grinco de turniĝanta ŝlosilo. En la duonlumo de la malfermita pordo li ekvidis Kristinan en ĉarma negliĝo.

Pardonu — ŝi diris — sed vi uzis tro multe da sedidativoj kaj mi ne rekonis vin. Kaj nun ... venu ĉe min!

*

*

*

En malfrua dimanĉa mateno Tadeo estis refreŝiganta sin en la banĉambro kaj duonvoĉe li kantetis la konatan refrenon: „**ESPERANTO ESTAS LA LINGVO POR NI**”.

transportigado de loko al loko la homaro faris grandegan progreson, kies mezuro estas la diferenco inter la „natura” irado kaj la flugo de la kosmaj ŝipoj, dum en la sfero de la pensinterŝanĝo ni daŭre staras senpovaj antaŭ la lingvaj barieroj, kontestante kun obstino la eblon de almenaŭ parta forigo de tiuj ĉi barieroj per la internacia lingvo nur pro tio, ke ĝi estas instrumento „nenatura”.

— Sed ja oni ne kontestas la eblon apliki komputerojn por la tradukado de diverslingvaj tekstoj.

— Tiu ĉi malkonsekventeco des pli pruvas la senraciecon de la konvinko pri la artefariteco de Esperanto, kiel imanenta manko, malebliganta elprofiton de tiu ĉi instrumento por la internacia kompreniĝo. Cetere, se temas pri la elektronaj tradukistoj, la eŭforio de antaŭ jaroj cedas nun antaŭ skeptikemo, la laboroj en tiu ĉi sfero progresas tre malrapide. La malfacilaĵo konsistas en la neeblo, almenaŭ ĝis nun, traduki la nelogikajn naturajn lingvojn en la lingvaĵon de la ciferoj, kiu estus komprenebla por la komputeroj. Alie dirite, la komputeroj ne scipovas ekkompreni la lingvojn, kiujn ni aplikas, ĉar la lingvoj estis evoluantaj elementece, entenas amason da nelogikaĵoj, malkonsekventaĵoj, esceptoj, idiomaĵoj, metaforoj ktp. Sed la plej taŭgaj tradukmaŝinoj ne ekskludas la bezonon de senpera interŝanĝo de pensoj kaj sentoj inter la homoj, tiel kiel la mekanikaj veturiloj ne ekskludis la neceson moviĝi perpiede, kiel la kino ne likvidis la teatron, kaj la televido ne kaŭzis pereon de la libro kaj gazetaro.

— Sed la aprezo de la lingvistikaj valoroj de Esperanto estas unu afero, kaj ĝia praktika elprofito, almenaŭ dume, sufiĉe malvasta — estas alia afero.

— Mi opinias, ke tiuj ĉi aferoj estas tamen en proksima ligo. La renkontata foje subtaksado de Esperanto ja havas bazon en la petrigita opinio pri pli bonaj kaj malpli bonaj lingvoj. Ĝi manifestiĝas ekzemple en la subtaksado de la lingvoj de la Tria Mondo. Oni prezentas riproĉojn ŝajnajn, kiuj tamen trovas fekundan grundon en la eŭropa aŭ anglosaksa konscio, ĉar ĝi estas konscio formata en tiu ĉi spirito de kelkaj jarcentoj. Bezonon de eŭropaj lingvoj en la novaj ŝtatoj de Afriko oni motivigas infanece simple: la loka lingvo ne povas plenumi la funkcion de ŝtata lingvo, ĉar ĝi estas tro diserigita je dialektoj. Ni akceptas ĉi tion kiel aksiomon, ne pensante pri tio, ke ankaŭ en Eŭropo ne ekzistas unuecaj lingvoj. Siciliano kaj torinano parolantaj siajn dialektojn entute ne interkompreniĝos, sed tio ĉi ne estas kaŭzo por ke oni ordonu al ili paroli angle.

Sur simila principo funkcias la ŝajnaj riproĉoj rilate Esperanton. Oni senkreditigas ĝin ekzemple pro la leksikologia nehomogeneco kaj krome tutsimple per la epiteto: konglomeraĵo, lingva miksaĵo. Ni akceptas tiajn epitetojn kun bona fido, kvankam la angla, cetere nomata lingvo „ĉionmanĝa”, estas simila miksaĵo, en kiu la leksikologiaj elementoj fremdaj dominas super la indiĝenaj.

Revenante al la praktikaj aspektoj de Esperanto mi volus ankoraŭfoje menci la analogion kun la lingvoj de la Tria Mondo. La limigiteco de la aplikado de ili en la skalo de la unuopaj landoj tute ne rezultas el mankoj enestantaj en ili mem, sed havas kiel la kialon eksterlingvajn faktorojn kaŭzajn. Cetere, idente la angla lingvo ne dankas sian popularcon en la mondo al apartaj kvalitoj. Tute kontraŭe, ĝi estas lingvo escepte nepreciza.

— Pri kiuj eksterlingvaj faktoroj vi pensas, sinjoro?

— Ekzemple malantaŭ la angla lingvo staras unuavice la ekonomia-politika potenco de la Unuiĝintaj

Ŝtatoj kaj de Britujo. En la nuntempa mondo ni havas rilaton kun la fenomeno, kiun oni devus nomi lingva imperiismo. Novkoloniismon oni pritraktas plej ofte en la ekonomiaj kaj politikaj kategorioj, dume tio, kion ni nomis lingva imperiismo, apartenas al la klasika armilaro ofensiva de novkoloniismo. Novkoloniismo, trudante fakte, kvankam neoficiale, la lingvojn de la metropoloj al la iamaj kolonioj, bonege konsciis pri la signifo de tiu ĉi fakto. La trudataj lingvoj estas iloj de la spirita kontrolo super la junaj socioj de la Tria Mondo, kaj per tio ĉi — rimedoj faciligantaj profundigadon de la dependeco de la novkreĝintaj sendependaj ŝtatoj al la antaŭaj metropoloj. Tiam subgrundon havas la ŝajne lingvistikaj argumentoj, pri kiuj mi ĵus parolis, kaj la intensaj streĉoj de kelkaj altgrade evoluantaj kapitalismaj landoj disvastigadi siajn lingvojn en la mondo. Tiuj ĉi agadoj entenas grandan dozon de hipokriteco, ĉar ili estas gvidataj favore al evidenta intereso de la imperiismaj ŝtatoj, kaj oni prezentas ilin kiel bonfaraĵon rilate la subevoluintajn landojn kaj realigas kuti-

Lingvaj

me en la kadro de interkonsentoj pri kultura kaj ekonomia helpo. Francujo, vide al la grava endanĝerigo de la pozicio de la franca lingvo en la mondo, preskaŭ rekte formulis la doktrinion de lingva imperiismo. Valoras scii, ke eĉ 45 proc. de la buĝeto de la franca eksterlanda servo apartenas al la kulturaj ataŝeatoj, ĉefe kun destino por disvastigado de la franca lingvo. Multaj ŝtatoj elprofitas por tiu ĉi celo, ekster la ŝtataj kanaloj, instituciojn duonŝtatajn el la tipo de British Council, Goethe Institut, Alliance Française. En Italujo funkcias Societo je la nomo de Dante Alighieri, subvenciata ne nur de la ŝtato, sed ankaŭ de lernantoj, kiuj preskaŭ devige apartenas al ĝi. Aŭ ni prenu la usonan Korpuson de Paco. Se oni pli proksime alrigardos ĝin, montriĝos, ke 75 procentoj de la volontuloj forveturas al la landoj de la Tria Mondo kun la tasko instrui la anglan lingvon.

— Ŝajnas tamen, ke en la kondiĉoj de la ekonomia-socia subevoluo, ĉe la manko de lernejoj, instruistoj kaj lernolibroj en la lokaj lingvoj — la instruado de fremdaj lingvoj estas efektiva helpo almenaŭ por parto de la socioj en la landoj sur la vojo de la evoluo.

— Kiaj estas la konsekvencoj de tio ĉi? Disvolvante la instruadon en la lernejoj sur fremda lingva bazo oni anticipe detranĉas la regresajn sociajn amasojn disde la eblo de lernado. Ja tio ĉi estas solvo por la elito. Ni ekrigardu al la landoj, en kiuj plue daŭras eŭropaj lingvoj kiel oficialaj; ja tie negranda parto de la socio parolas tiujn ĉi lingvojn. Tio ĉi plej ofte estas eŭropeizita elito. Ĝi estas ĝuste metodo de la kolonia politiko, ke per la lingvo oni akiradu kvazaŭ aŭtomatan kontrolon super la elito de la unuopaj evoluantaj landoj. Cetere, la trudita fremdlingva instruado ankaŭ ne funkcias plej bone. Mi menci la ekzemplon de Somalo, kie — per la kosto de la indiĝena loĝantaro — okazas la itala-angla rivalado. La mezaj lernejoj estas principe ekregitaj de la italoj, dum en la nemultaj superaj lernejoj regas la angloj. Dume en la elementaj lernejoj la plej ĝenerala estas la araba lingvo. La juna somalano komencas la edukigon per lernado de la Korano en la araba lingvo, kiu ofte estas fremda lingvo, poste en la itala li enkapigas la historion de Italujo kaj fine li studas en la angla. Oni povas imagi la rezultojn de tia lernado.

— *Se mi bone scias, la lingvoj uzataj en Somalo ne havas eĉ alfabeton.*

— Tio ĉi estas ĝuste la argumento, kiun mencias kaj la italoj, kaj la angloj, sed tio ĉi estas argumento trompa. Ni rememorigu al ni, kiom da lingvoj de aziaj popoloj ricevis alfabeton en Sovetunio dum la tempo de Lenin. Kvarcent jarojn post Kopernik ni ne scipovas, bedaŭrinde, liberigi el la katenoj de eŭropocentrismo. La kuracisto, kiu forveturas por labori ekzemple en Kongio, eĉ ne ekspensas pri tio, ke li povus lerni la lingvon de siaj pacientoj. Mi prezentos karakterizan ekzemplon. Italaj arĥeologoj, ne scipovante interkompreni kun laboristoj helpantaj ĉe elfosado en Irano, petis pri venigo de studento, kiu entreprenus gvidadon de kurso de la lingvo... angla por la irananoj. Tio ĉi estas fakto, kiu bonege karakterizas la eŭropocentrisman mentalon. Novkoloniismo grasigas ĉe tio ĉi siajn negocojn, ĉar estas konate, ke la fremdan lingvon devas postsekvi fremdaj libroj, ideoj, reklamoj kaj fremdaj varoj.

barieroj

— *Ĉu en la landoj de la Tria Mondo ekzistas konscio pri tio ĉi?*

— Jes, ekzistas multaj ekzemploj de efika eliminado de eŭropaj lingvoj el la publika vivo kaj instruado. En la Norda Vjetnamo la vjetnamigo de la instruado alportis bonegajn rezultojn. En Tanzanio okazas interesa procezo de anstataŭigado de la angla lingvo per svahilo. Simile estas kun Alĝerio, kie iom post iom oni arabigas la instruadon. Gustadire, ĉie, kie vekigas la nacia konscio, la nedisigebla manifestiĝo de tio ĉi estas kreskanta malinklino al la lingvoj de la eksaj metropoloj. Por kio oni serĉu malproksime: la antaŭnelongaj studentaj tumultoj sur Madagaskaro havis kiel la bazon interalie la postulon limigi la influojn de la franca lingvo en la instruado. Tiuj ĉi procezoj kompreneble estos profundigantaj, la socioj de la Tria Mondo formos por si proprajn naciajn lingvojn. La nuna tolerado de la fremdaj lingvoj rezultas el la pasema nepreco, sed ankaŭ el la manko de alternativaj solvoj.

— *Ĉu Esperanto povas esti tia alternativa solvo?*

— Sendube. Kompreneble, en la sfero de la internaciaj rilatoj. Esperanto havas du gravegajn ecojn: la facilecon kaj la neŭtralecon. La simpla, klara konstruado, la senescepteco de la reguloj — permesas aktive ekregi ĉi tiun lingvon en mallonga tempo. La lingvan korektecon en Esperanto indikas logikaj kriterioj, kio donas grandan liberon ĉe la aplikado de tiu ĉi lingvo kaj faras el ĝi instrumenton eksterordinare elastan. Ne ekzistas klaraj kriterioj de la korekteco en la naturaj lingvoj, el kio fontas la bariero de necerteco, antaŭ kiu ni ĉiam staras uzante ilin. Ankaŭ pro tio ĉi kaŭzo ili ĉiam restas por ni lingvoj fremdaj. Esperanto, kiel lingvo de neniuj, fariĝas lingvo propra por ĉiu, kiu ellernos ĝin. Mi havas ĉi-rilatajn proprajn spertojn. Mi regas ses lingvojn, sed nur la itala kaj Esperanto estas MIAJ lingvoj; la ceteraj: la angla, franca, germana kaj hispana ĉiam restos FREMDAJ lingvoj, kvankam mi oferis grandegan penon por ekregi ilin. Miaj ŝancoj rilate la anglon estas multe malpli grandaj, kiam mi volas gvidi kun li en la angla seriozan diskuton, aŭ kiam mi volas skribi kaj publikigi en tiu ĉi lingvo sciencon verkon. Krom ĉiuj konsideroj, Esperanto incitas nenies naciajn sentojn kaj ankaŭ pro tio ĉi kaŭzo

ĝi renkontados ĉiam pli gradan interesiĝon precipe en la Tria Mondo, kie la nocio „lingva imperiismo” fariĝas ĉiam pli konata kaj komprenata.

— *Sed ĉu estas ankaŭ ĉiam pli komprenata la ideo de internacia lingvo?*

— Plej genia ideo restos nur ideo, se ĝi ne trovos vastan socian subtenon. En la kazo de Esperanto temas pri kreado de la jam menciitaj eksterlingvaj faktoroj kaŭzaj, kiuj faciligus la disvastigadon de ĝi. Ĝuste al tio servas nia agado. Se temas pri la Tria Mondo, ni kalkulas je helpo de la socialismaj landoj, precipe de Pollando, kiu ja estas la patrujo de Esperanto. La socialismaj landoj, kiel ankaŭ Esperanto mem, estas liberaj de la stampo de koloniismo.

— *Ĉu tamen la fakto, ke malantaŭ Esperanto staras la eŭropa kulturo, ne prezentas objektivan obstaklon en la disvastigado de ĝi en la landoj de la Tria Mondo?*

— Ĝi ne estas preciza konstato; Esperanto havas apogbazon ne nur en la eŭropa kulturo. La senperan kontakton kun la japana, ĉina, vjetnama literaturoj mi dankas ekskluzive al Esperanto. Esperanto havas dispoziciojn por fariĝi la komuna denominatoro de interŝanĝo de la kulturoj de la tuta mondo. La ofensivo de la japanoj en la esperantista movado dum lastaj jaroj kaŭzis la plivastiĝon de la vortprovizo de la internacia lingvo je nocioj, kiujn oni vane serĉus en la vortaroj de la eŭropaj lingvoj.

— *Alrigardante la debatojn de via kongreso, kiuj havis senperan karakteron, mi inklinas konsideri kiel anakronismon la nun aplikatajn tradukmetodojn, kiujn mi observis en multaj internaciaj kongresoj.*

— En la internaciaj organizaĵoj la kostoj de la kelklingvaj tradukadoj atingas astronomiajn sumojn. UNO precipe povas legitimi sin per sumoj, de kiuj oni ricevas kapturiniĝon. Parolante tamen pri la lingvaj malfacilaĵoj, mi pensas pri kiel eble plej vasta internacia cirkulado, mi pensas pri la lingvaj barieroj, antaŭ kiuj haltas la interŝanĝado de pensoj de grandegaj homaj amasoj, kiuj en la hodiaŭa migranta mondo renkontiĝas sur la internacia platformo. Mi volus esti antaŭ ĉio esprimanto de la intereso de la junularo, kiu estas plej scivola pri la mondo. Ja estas absurdo enkapigadi kelkajn lingvojn, se tiun ĉi tempon oni povus destini por akirado de pli konkreta scio. La lingvaj malfacilaĵoj estas grandega kaj urĝega problemo de la nuntempa mondo. Estas afero evidenta, ke la daŭre vastiĝanta, vaste komprenata internacia interŝanĝo pli kaj pli grandigados tiun ĉi problemon. En tiuj ĉi cirkonstancoj kreskados la signifo de la internacia lingvo kiel la plej racia solvo. Paca kunlaboro de la nacioj estas la fundamenta kondiĉo de ĝia evoluo.

— *Ĉu el tio ĉi fontas via interesiĝo pri la aferoj de la sekureco kaj kunlaboro en Eŭropo?*

— Kompreneble, ni subtenas ĉiun iniciaton, kiu plifirmigas la fundamentojn de la internacia kunlaboro. Eŭropo estas por ni dume la plej grava tereno de la agado, tial ni aliĝis al la movado subtenanta la ideon de kunvoko de la eŭropa konferenco pri la sekureco kaj kunlaboro. Ni eniris en la konsiston de la kolektivo de internaciaj organizaĵoj, kiu dum pli ol unu jaro preparadis la Konferencon de Junularo pri la Afero de Sekureco kaj Kunlaboro en Eŭropo, kunvokitan por aŭgusto 1972 en Helsinko. Esperanto estas hodiaŭ fenomeno socia kaj nur kiel tia ĝi estas inda interesiĝon. Ne valorus oferadi la junaĝon nur pro la dek ses gramatikaj reguloj de Esperanto.

Interparolis
ROMAN DOBRZYŃSKI

La intervjuo aperis en „Argumenty” (nr 33/72), unu el la plej gravaj semajnevuo en Pollando

servoj - informoj - adresoj

● **LA EKSTERLANDAJN LEGANTOJN DE „PE”** ni informas, ke Pola Radio anoncas ĉiujare almenaŭ du konkursojn por siaj eksterlandaj aŭskultantoj. La ĉefpremio en tiuj ĉi konkursoj estas senpaga rondvojaĝo tra Pollando, inkluzive senpagan en — kaj revenon al kaj el nia lando. La regularojn de la konkursoj oni petu ĉe: Pola Radio, Esperanto-Redakcio, 00-950 Varsovio, Box 46, Pollando. Ĉe la sama adreso estas senpage ricevebla nova, presita konsilteksto „Kiel fari la aŭdeblecon pli bona?”

● **LA HISPANAJ ESPERANTISTOJ** povas aboni la revuon „Pola Esperantisto” kaj mendi la polajn Esperanto-eldonaĵojn pere de: Lib-

reria Herder, Calle de Palmes 26, Barcelona — 7.

Laŭ informo ricevita de „**ARS POLONA — RUCH**”, la revuon „**POLA ESPERANTISTO**” oni povas aboni en Sovetunio pere de la filioj de „**SOJUZPJEČATJ**” en ĉiuj respublikoj.

● **POLAJN ESPERANTO-ELDONAĴOJN KAJ JARKOLEKTOJN DE „POLA ESPERANTISTO”** el la jaroj 1967, 1968, 1969, 1970 kaj jarkolekton de la ne plu aperanta revuo „**Tamen**” (el 1967) oni povas mendi ĉe: „**Ars Polona — Ruch**”, 00-068 Varsovio, Krakowskie Przedmieście 7, Pollando. **ĈE LA SAMA ADRESO** estas ankaŭ mendebla **NOVA KONVERSACIA FRAZARO**

POR LA TURISTOJ s.t.: „**Rozmówki esperanckie**” (dulingva: pola-esperanta) plume de Andrzej Pettyn.

● La plenrajtigito de la Ĉefa Estraro de PEA por la venigado de la Esperanto-libroj pere de la librovendejo „**Światowid**” en Szczecin, estas s-anino **MIŁOSŁAWA KOŁIŃSKA**, 71-475 SZCZECIN, STR. SOPOCKA 2/2. Ŝi kolektas mendojn de la unuopaj membroj de PEA, listigas ilin kaj prezentas al la librovendejo „**Światowid**”, kiu proksimume du fojojn en la jaro realigas la mendojn. Sendante vian mendon, menciuj la nomon de la aŭtoro, la titolon de la libro kaj la eldoninton.

Kien evoluas la homo?

daŭrigo el la 10 paĝo

kapablas la tekniko. Kvankam la evoluo perfekte adaptis nin al la vivo sur la Tero, sur aliaj planedoj la kondiĉoj estas ekstreme malsamaj kaj multe pli facila estas unuafoja universala alikonstruo de la homa gento ol penoplena transformo de la Universo laŭ niaj bezonoj. Nia aktivado direktiĝas do al sendependiĝo disde la medio. Unuavice tio ĉi efektiviĝas verŝajne per plibonigo de la jam ekzistantaj sistemoj. Ekz.: de la sangocirkulado pere de enkorpiĝo de artefarita koro; de la skeleto — pere de ostoj faritaj el iu pli firma materialo; per kovro de la korpo per neorganika haŭto; per aldono de perceptilo pri la radioaktivo, ktp. Pri la neevitebleco de la procezo pruvas jeno:

Jam hodiaŭ ni scipovas anstataŭigi perditajn korpartojn aŭ malsanajn organojn per pli malpli perfektaj protezoj. En la estonto la grado de ilia perfekteco certe plialtiĝos. Finfine ni ekstaros antaŭ la paradoksa situacio, ke artefarita mano estos pli forta kaj pli lerta ol la natura, artefaritaj gamboj permesos pli rapidajn vagadojn ol la naturaj, kaj eĉ artefaritaj oreloj pli bone aŭdos kaj artefaritaj okuloj pli bone vidos, ol la samaj organoj de la normala homo. La konkludoj estas facile fareblaj, kiam oni alrigardas la nuntempajn virinojn, kiuj nur por plibeliĝi volonte surkapigas perukojn, surpalpebrigas artefaritajn okulharojn kaj utiligas eĉ artefaritajn dentojn kaj mamojn.

Tamen la sfero de niaj supozoj ankoraŭ konstante koncentriĝas sur la tera medio, kvankam la futuro de la homaro estas la kosmaj flugoj, akiraĵoj kaj ekloĝo sur diversaj planedoj. La nuna organismo de la homo ne eltenas eĉ kelkajn tagojn sen akvo, kelkajn minutojn sen aero kaj estas malmulte rezistema kontraŭ la troŝarĝoj kaj radioaktivo. Forigo de tiuj ĉi mankoj jam ligiĝas kun profunda alikonstruo de la homa organismo kaj ĉefe kun transiro al alia energetiko. La kemia energio, produktata ĉefe en la procezoj de la oksido, povas sufiĉi nur en medio riĉa je oksigeno kaj brulmaterialo — necesas tamen konstanta kompletigado de ili. Turnpunkton prezentus fridnuklea energetiko enkondukita en la ĉelojn. Mi pensas pri utiligo de nukleaj procezoj, eĉ de sintezo (kio estas malpli realigebla), kiu realiĝus en la temperaturoj de proksimume 10° K, kiam la plimulto de la korpoj ekzistas en la solidstato. Tio ĉi signifus rezigni pri la pulmoj kaj digesta kanalo en ties nuna formo. Estiĝas la problemo, per kio oni plenigu la malplenaĵon. Ĉu oni ŝanĝu la internan konstruon de la organismo sen tuŝi ĝian eksteran aspekton, aŭ ĉu oni ĝenerale rezignu pri ĝia nuna formo kaj aspekto. La laste menciita projekto verŝajne ne realiĝos (eble kelkaj generacioj de „novaj homoj”), kun ĝi ligiĝas la problemo de plimul-

tiĝo, de la seksa vivo kaj de dusekseco. Verŝajne eblas tiuj ĉi ŝanĝoj en la cerbo, kiuj kaŭzos, ke la homa sentos la seksaltiron al organismo tute malsimila al la nuna aspekto de la homo (ekz.: havanta radojn anstataŭ gamboj); tamen mi opinias, ke ĉi-rilate decidus moralaj principoj kaj kutimoj parolantaj por konservado de la nuna homaspekto kaj la dusekseco. Malmulte ebla por la homo ŝajnas esti rezigno pri la sentoj neraciaj el la scienca vidpunkto, kiel amikeco, amo ktp. Ili estas (krom la instinkto, la instinkto pri la neceso vivi kune kun aliaj homoj) siaspeca interligilo tenanta la homojn are. Oni ne povas permesi, ke ni solece vivu kiel rabobestoj. La celkomuneco permesis al ni krei la teran civilizon kaj ĝi permesos al ni estonte atingi la plej malproksimajn galaksiojn. Tiuj ĉi problemoj estas certe tre interesaj, kvankam ankoraŭ estas ankoraŭ tro frue por solvi ilin. Pensiĝas nin tamen io alia, pri kio jam multaj futurologoj estas cerbumintaj, nome — kiu estos la fina rezulto de la memevolupprocezoj. En la komencaj stadioj de tiuj ĉi procezoj facile videblas la strebo al sendependiĝo disde la medio. Tiu konsekvenca plibonigo de la homeostazo gvidus sendube al transformo de la homo en perfektan homeostaton, kies infludependo al la Universo estus tute nuligita kaj kiu eĉ fariĝus Kosmo por si mem. Tiel tamen ne povas okazi, ĉar la homeostato devas plenumi multe malpli da kondiĉoj; kaj por ni necesas ne nur la praktika konsumigmalebleco de la homa organismo, sed ni ankaŭ starigas pluajn kondiĉojn, dank’ al kiuj ekz. ni anticipe forigos la eblon veturigi homojn en la intergalaksian spacon, kie pro la materimanko minacas al ili multe malpli da danĝero. Ĉi-loke ni malproksimiĝis sufiĉe for de la teoria procezo de la homeostazo. Ni ne strebas limigi la kontaktojn kun la natura medio, tiel kiel ni ne defendas nin kontraŭ malsano evitante malsanulon, sed pere de vakcinado. Do, vakcinado estas la unua etapo, aŭ pli ĝuste — antaŭpaŝo al la memevoluo, kiun ni senhezite konsentis. Ĉu la samo okazos ĉe pluaj etapoj — mi dubas, tamen la procezo mem estas miaopinie neevitebla.

Laŭ mia kapablo mi penis perargumenti mian vidpunkton, sed mi bonege komprenas, ke estas nefacile konsenti kun ĝi. La aferoj de mi tuŝitaj certe postulas profundpenetrajn pripensojn, serĉadon de pluaj kontraŭaj kaj poraj argumentoj, sed ne dubblas, ke jam hodiaŭ ni devas ellabori nian propran vidpunkton pri la problemo, por ke ni ĝustatempe (mi opinias, ke tio okazos baldaŭ) povu ne nur rimarki la komencojn de la memevoluo, sed ankaŭ povu diri „jes” aŭ „ne” al la proponoj de sciencistoj, ĉar la problemo koncernas la tutan homaron.

Tiujn, kiujn mi sukcesis scivoligi pri la problemaro de la futurologio, mi volus stimuli tralegi kelkajn preparolojn de la temo en la libroj de Stanisław Lem — „*Summa Technologiae*” kaj „*Fantastiko kaj futurologio*”, el kiuj ankaŭ mi kaptis multajn ideojn.

BARTOSZ MILEWSKI

Hirtaj pensoj

PRECIPE KVIN...

JERZY GRUM

Mi ne estas bona naĝanto, sekve mi certe dronus en la maro de inko, kiu fluis el sub la plumoj de nombregaj artikolaŭtoroj provintaj trovi panaceon je venko de Esperanto. Almenaŭ do mi ne estos esceptulo provante prezenti mian ideon ĉi-rilate.

Skribi ĉi tiun felietonon instigis min informoj pri la enketo, kiun anoj de la Brita Esperantista Asocio faris inter 100 parlamentanoj. El tiuj ĉi 45 favoras Esperanton kiel la internacian lingvon; 14 aŭ kontraŭas aŭ opinias, ke la angla lingvo devas esti la internacia; 13 ne kontraŭas, kaj 28 ne indikis la preferon.

Inter la favorantoj estas George Thomson, antaŭe ministro kun aparta respondeco pri la Komuna Merkato. 8 parlamentanoj jam studis Esperanton, inkluzive de Harold Wilson, la antaŭa ĉefministro de Britujo. Granda nombro da parlamentanoj bedaŭras, ke

Esperanto estis neglektata en la lernejoj kaj en la radio kaj televido. Tamen, la decido starigi kursojn estas la respondeco de la koncernaj sendependaj instancoj en Britujo.

Unu surpriza rezulto estis, ke Geoffrey Rippon, la ministro kun respondeco por la Komuna Merkato en la nuna registaro, respondis, ke oni spertis nenian bezonon por instigi la uzadon de Esperanto kiel internacia lingvo en la funkciado de la Komuno.

Aliflanke, la Komitato por la Kulturaj kaj Sciencaj Problemoj de la Eŭropa Konsilantaro mem asertis: „Sed ni scias laŭ nia propra sperto, ke, kiam homoj, kiuj uzas diversajn lingvojn, kunvenas pro iu komuna intereso, ili ofte renkontas gravan barieron rilate al la lingvo.”

Ciujn ĉi informojn mi prenis el la januara numero de la revuo „Esperanto”, la presorgano de UEA.

Kion mi volus aldoni? Tion certe, ke nepre estis profeto s-ano Ib Schleicher komencinte sian konatan kampanjon cele la danajn parlamentanojn. Laŭ mia plej profunda konvinko, estanta rezulto de multaj trapensoj kaj spertoj, kvin estu la ĉefaj atakceloj por Esperanto: la parlamentoj, ĉar iliaj anoj reprezentas la volon de la popolo, la amaskomunikiloj — ĉar ili anoncas tiun ĉi volon; la lernejoj — ĉar en ili, laŭ la volo de la popolrepresentantoj la geinfanoj povas ekoni la internacian lingvon, kaj la turismo kaj sporto — ĉar ili estas la plej internaciaj fenomenoj, en kiuj praktike ekzameniĝas la valoro de Esperanto por ties uzantoj.

Se ni limigos nian agadon nur al tiuj ĉi kvin kampoj, sed ni faros ĝin samtempe ĉiuloke — la afero de la internacia lingvo notos mejlan paŝon antaŭen.

En la tagoj 16—29.IX.1973, en la pitoreska montara ripozloko Międzygórze okazos la IX Internacia Esperantista Fериado „Ora Pola Aŭtuno”. La feriadon organizas la Feria Fakto de la Polaj Sindikatoj kaj la Vojevodio Filio de la Pola Esperanto-Asocio en Wrocław.

La Internacia Esperantista Fериado en Międzygórze dum la ok lastaj jaroj fariĝis unu el la plej popularaj esperantistaj aranĝoj en la mondo. Kune dum sep jaroj partoprenis ĝin 2.075 esperantistoj el 21 landoj. Multaj personoj partoprenis la feriadon kelkfoje.

La programo antaŭvidas interalie: konsultajn horojn pri lingvaj problemoj, prelegojn, internacian ves-

„ORA POLA AŬTUNO“

peron, polan vesperon, lernadon de esperantlingvaj kanzonoj, atrakciajn ekskursojn, distrajn prezentadojn, dancamuzon, balon de ĉifonuloj, fajregon kun rostado de virŝafo kaj kolbasoj, kaj multajn aliajn distrajn kaj kulturajn programojn.

La feriadon oni povas partopreni nur por du semajnoj. La partoprenkotizo estas 1.570 zł. (100 zł. — la aliĝkosto kaj 1.470 zł. — la restadkosto) aŭ 72 US dol., 1.000 kronoj es., 1.350 forintoj, 330 DM GDR, 103 rubloj, 855 leoj, 81 levoj, 42.500 italaj liroj, 1.200 dinaroj, 28 anglaj pundoj, 350 svedaj kronoj, 235 guldenoj, 370 francaj frankoj, 234 DM GFR.

La limdato por la aliĝado estas la 15 de julio 1973. Nombro da lokoj limigita (252). Pri akcepto de la aliĝiloj decidas pli frua aliĝo.

La detalaj informiloj pri la feriado kaj aliĝiloj estas riceveblaj de: Pola Esperanto-Asocio, P. O. Kesto 16, PL 50-952 Wrocław 17, Pollando.

En la jaro 1972 jenaj 17 radiostacioj regule disaŭdigis programojn en la internacia lingvo:

1. Vieno (Aŭstrio); 2. Muritiba; 3. Sorocaba (Brazilo); 4. Sofio (Bulgario); 5. Bratislava (Ĉeĥoslovakio); 6. Pekino (Ĉina Popola Respubliko); 7. Clermont-Ferrand (Fracujo); 8. Sabadell; 9. Valencio (Hispanujo); 10. Romo (Italujo); 11. Zagreb (Jugoslavio); 12. Tananarive (Malgaŝa Respubliko); 13. Gdańsk; 14. Varsovio (Pollando); 15. Tallin (Sovetunio); 16. Bern (Svislando); 17. Columbus, Ohio (Usono).

Entute do 17 radiostacioj en 14 landoj, kompare kun 19 stacioj en 16 landoj en la jaro 1971. El la radiostacioj, kiuj disaŭdigis en 1971 programojn en Esperanto, ĉesigis la elsendojn Rosario (Argentino), Stoke-on-Trent (Britujo) kaj Sher-

RADIOELSENDOJ
EN LA INTERNACIA
LINGVO EN LA
JARO 1972

brooke (Kanado). Aliflanke Tenerife havis la elsendojn en 1972.

Tiuj ĉi stacioj entute elsendis 2.354 programojn, kiuj daŭris entu-

te 875 horojn, kompare kun 2.817 programoj kaj 960 horoj en 1971.

Al la supra listo necesas aldoni la televidan kurson de Esperanto, kiun faris kaj prezentis la nederlanda TELEAC. Tiu ĉi kurso konsistis el 52 elsendoj dum 30 minutoj dufoje ĉiusemajne, do entute ĝi daŭris 26 horojn.

Pluraj aliaj radiostacioj sporade disaŭdigis programojn en Esperanto, kaj multaj havis elsendojn pri la internacia lingvo, precipe en ligo kun la Universala Kongreso de Esperanto en Portland (Usono), kun la Seminario pri la Problemo de la Lingva Komunikado (Frostavallen, Svedujo), la Kultura Festivalo en Budapeŝto kaj multaj aliaj konferencoj, seminarioj kaj similaj renkontiĝoj, en kiuj Esperanto estis la oficiala lingvo.

(Laŭ CED)



POLISH OCEAN LINES

POLAJ OCEANAJ LINIOJ

La centralo: Gdynia, 10 Lutego 24, Pollando

La telefono: 21-29-01 (10 linioj). La telegramo: POLOCEAN. La telekso: 054-231

RĜULA NAVIGADO KUN MONDA ATINGECO

— Pli ol 165 ŝipoj por la transportado de kargoj kaj pasaĝeroj —

POLLANDO — KANADO

t s s „STEFAN BATORY”. Porpasaĝeraj servoj sur la linio

G D Y N I A — M O N T R E A L

PRAMAJ SERVOJ (Pasaĝeroj, personaŭtomobiloj, kamionoj)

ŖWINOUJŖCIE — YSTAD

mf „SKANDYNAWIA” mf „WAWEL”

G D Y N I A — H E L S I N K I

mf „GRYF”

Antaŭ dek unu jaroj en la limurbo Cieszyn fondiĝis Klubo de Proponoj, kiu ekde sia komenco ligiĝis kun la Esperanto-movado. La ĉefa eco de la Klubo estas — kiel tion pruvis la praktiko — tute nova formo de la enpenetrado en la lokan socion, kio tamen ne signifas, ke ĝiaj aktivecoj ne havas la karakteron de popularaj agadformoj. Kaj ĝuste sur tiu ĉi kampo — la kampo de internaciaj kontaktoj — ĝiaj anoj-esperantistoj havas siajn rimarkindajn meritojn.

Mi rememorigu, ĉar mi jam skribis pri tio en „Pola Esperantisto”, ke nia Klubo tute ne similas al la tradicia kluba organizformo. Tio ĉi ne rilatas nur la fakton, ke nia Klubo seniĝis je ĉia burokrateco, ke ĝi havas neniun statuton, ke ĝi submetiĝas al neniuj oficialaj postuloj kaj devoj, sed la kerno de ĝiaj sukcesoj estas eble en la kapablo allogi el diversaj socitavoloj kaj medioj homojn, kiuj aŭtomate fariĝas ĝiaj anoj-kontribuantoj. Ĉar la Klubo ne havas formalajn membrojn, do tiun anon oni taksas pli valora, kiu pli multe kontribuas en la aktivecoj de la Klubo. Kaj tiuj ĉi estas tre multaj kaj diversspecaj, malgraŭ tio, ke nia Klubo profitas de neniuj subvencioj, de neniuj helpo flanke de oficialaj instancoj. Ĝi vivas — kiel oni tion ĝenerale kutimas nomi — kvazaŭ per propraj suktoj.

La konstanta programero de la Klubo de Proponoj estas la ĉiuvendredaj renkontiĝoj, popularaj jam en la tuta regiono de Cieszyn, dum kiuj oni gastigis multajn eminentajn esperantistojn polajn kaj eksterlandajn. Krom tio la Esperantista Sekcio de la Klubo vaste kontaktas kun diversaj esperantistaj medioj en la tuta mondo, prezentante al ili la unikajn agadformojn de nia Klubo, ĉar ĝiaj ideoj ja similas al la ideoj de la tutmonda Esperanto-movado. Ili diras, ke ĉiu ano de la Klubo devas servi al la internaciaj amikeco kaj paco. Do, ĉiu vizito de la eksterlanda gastoj en Cieszyn donas bonan okazon por oficiale montri tiun ĉi nian sintenon kaj tiele nia Klubo gajnas siajn elprovitajn

amikojn kaj simpatiantojn en multaj landoj.

La klubanoj kontribuas tamen ne nur por aranĝi la vendredajn renkontiĝojn, ili kunhelpis ankaŭ en multaj aliaj aktivecoj de la Klubo. Oni menciis ekzemple la iniciatitan en la Klubo fondon de la loka filio de la Naturprotektita Ligo, de la Gardenamika Societo, de la Societo de Amikoj de la Pola Lingvo kaj similaj. En la Klubo maturiĝis ankaŭ penso, kiu poste

instancoj, asocioj kaj organizaĵoj. Guste la klubanoj disvastigis tra la tuta lando la humanan penson esprimatan per la alvoko: „rideto por ĉiu”. Por tiu ĉi „unu plia rideto”, destinita por la malsanuloj, pledis la anoj de la Klubo el la vicoj de la Sanservo. Por la malsanulo, homo precipe impresigema pri la homa boneco kaj bonkora rideto.

Alia aktiveco de la Klubo estas kunlaboro kun la Pola Asocio de la Blinduloj. Krom „merkredaj renkontiĝoj ĉe blinduloj”, oni aranĝas por ili komunajn ekskursojn, prelegojn, renkontiĝojn, kio donas bonan ekzemplon por la aliaj lokaj organizaĵoj de la blinduloj en Pollando.

Ne laste ni citu ankaŭ la viglan kunlaboron kun similaj kluboj de Proponoj — instruista kaj esperantista, kiuj fondiĝis dank’ al s-ano Józef Golec ĉe la Pola Marbordo. Ankaŭ ilia agado alportis jam rimarkindajn fruktojn sur diversaj kampoj.

Pri nia Klubo de Proponoj aperis ĉirkaŭ 1500 publikajoj en preskaŭ cent gazetoj landaj kaj eksterlandaj. Tre ofte estis substrekata en ili la aktiva partopreno de la esperantistoj en la realigado de la kluba programo. Programo diktata de la vivo mem, de la ĉiutagaj bezonoj. Kaj se post la dekunujara agado oni povas diri, ke la Klubo plenumis sian malfacilan ekzamenon antaŭ la praktiko de la vivo, tiam en tiu ĉi aserto estas io pli, ol nura satisfakcio. En tio ĉi enestas samtempe la kredo kaj espero, ke la ideo de nia movado, ke ĉiuj esperantistoj aŭ homoj simpatiantaj al tiu ĉi movado reprezentas grandan kreaforon, kiun oni devas profiti por la idealoj de la progreso, por la valoroj decidantaj pri la feliĉo de ni ĉiuj. Ĉiu, eĉ la plej eta ago, plenumita en la nomo de tiu ĉi principo, servas al la homo, kontribuas en iu grado al la feliĉo de la tuta homaro.

Kun tiu ĉi espero, kun tiu ĉi granda optimismo maturiĝas ĉiam novaj kaj novaj iniciatoj en la Klubo de Proponoj en Cieszyn, kiu gajnas ĉiam pli kaj pli da imitantoj en Pollando kaj en eksterlando.

ESPERANTO EN

„KLUBO

DE PROPOJ”

WŁADYSŁAW OSZELDA

konkrete ĝis kaj akceptiĝis kiel nova iniciato — la ideo pri „malkovrado de interesaj homoj”, alportante per tio ĉi al la pola turismo novajn humanismajn valorojn. La iniciatintoj de tiu ĉi aktiveco opiniis, ke por la turistoj kaj migrantoj devas esti interesa kaj atentinda ankaŭ la „homo” mem. Kiom da bonaj okazoj donas tiu ĉi simpla ideo por prezenti homojn ofte simplajn, sed tamen en sia speco interesajn kaj popularigindajn. Tion ĉi plej bone povis kompreni la esperantistoj, kiuj dum siaj migradoj kaj eksterlandaj vojaĝoj, profitante la scion de la internacia lingvo, ĉefe serĉas la interhomajn kontaktojn.

Oni povus multe skribi pri la socie utilaj aktivecoj iniciatitaj kaj gvidataj de nia Klubo. Ĝi kunlaboras kun multaj laborentreprenoj,

